

Esperanto
1-23562/3 (1939)

Esperanto

Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Vol. 3. N-ro 10

Okt.-Nov. 1939

I. E. L.

DAŬRIGAS

SIAN

LABORON !

DIDAKTA

*Ilustrita Lernolibro de Esperanto
por praktika komenca kurso, de*

DELFI DALMAŭ, L. K.

★

La vortoj kaj la temoj de la ekzercaro estas elektitaj por tuja uzeblo.
Oni lernas senkonscie la gramatikajn regulojn de Esperanto.

*Prezo : 4 respondkuponoj, aŭ
1 ŝilingo, aŭ frankite.*

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

::: Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. :::



Kataluna Antologio

kompilita de

JAUME GRAU CASAS, L. K.

★

Verko aprobita de la Esperantista Akademio

★

Bonega elekto el la kataluna literaturo

★

*416 grandformataj paĝoj
Prezo broŝ. 6 ŝ. 9 p., aŭfranko 6 p.*

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

::: Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. :::

Esperanto *Internacia*

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG,
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.

Vol. 3. N-ro 10

Okt.-Nov. 1939

I. E. L.

DAŬRIGAS

SIAN

LABORON !

I. E. L. daŭrigas sian laboron

Kion oni vidis alveni delonge, kvankam oni ne volis kredi ke tiel baldaŭ ĝi okazos, — nun la fataleto ĉeestas. Eksplodis la milito, kaj denove la mondo ĝuas la spektaklon de furioze sin kontraŭbatalanta, reciproke sin buĉanta homaro. Nur dudek jaroj pasis, de kiam la armeoj, post la plej sanga ĝis tiam milito de la mondhistorio, demetis la armilojn, kaj jam denove komenciĝis la freneza ludo.

Inter la viroj vokitaj al la frontoj troviĝas multaj esperantistoj. Ili plenumos konsciencie la devon kiun la situacio kaj la fatalaj cirkonstancoj al ili altrudis.

Same faros la mobilizitaj samideanoj en neŭtralaj landoj.

Sed multaj ankoraŭ restas hejme, plenumas tie aliajn devojn. Kun ili restas niaj samideaninoj. Sur ili, la hejmrerestintoj, kuŝas grava tasko kaj respondeco ankaŭ koncerne nian aferon.

Esperanto, la ideo de lingvo interpopola, ja estas kaj restas alta idealo. Ĝi donas al ni la esperon ke, kiam la popoloj povos reciproke sin kompreni buŝe, per unu lingvo komuna, internacia, ili des pli facile interkompreniĝos ankaŭ per la k o r o. Kaj, kvankam Esperanto per si mem ne evitigos estontajn militojn, ĝi tamen estas eminenta ilo por, kune kun aliaj rimedoj, akceli pli solidan kaj pli longdaŭran pacon.

Esperanto do plene meritas ke, ankaŭ dum la milito, ni dediĉu al ĝi nian tempon kaj laboron, — ke ni faru ĉion por defendi ĝin kontraŭ pereco, gardi ĝian pozicion, eĉ enkonduki ĝin, se eble, en novajn rondojn kaj regionojn.

La esperantistaro ne forlasos sian idealon sed fidele konservos kaj defendos ĝin dum la malluma tempo, ĝis la suno de la paco releviĝos.

★

Internacia Esperanto-Ligo daŭrigos sian funkciadon kiel eble plej normale. Ni ne eldonos la projektitan Supplementon al la Jarlibro, ĉar

ĉiutage alvenadas informoj pri ŝanĝoj kaj ĝia enhavo ne povus esti aktuala. La **Jarlibro por 1940** aperos kiel eble plej frue, preskaŭ certe en marto. Niaj **oficialaj organoj** elirados seninterrompe.

La nuna «Esperanto Internacia» aperas meze de oktobro; la sekvonta numero aperos komence de decembro. En 1940 «Esperanto Internacia» denove aperos regule ĉiumonate.

Kio koncernas la semajnan organon «Heroldo de Esperanto», ĝi povos, pro kaŭzoj ekster nia povo, dum la resto de la nuna jaro aperi nur monate aŭ duonmonate; sed niaj membroj laŭ kategorio MAH, kiuj tion deziras, povas ricevi plenvolan kompenson pro la mankantaj numeroj, konforme al la kondiĉoj publikigitaj en «Heroldo» de la 1-a de oktobro. En 1940, «Heroldo de Esperanto» aperos denove regule, minimume dufoje en la monato, je duone reduktita abonprezo.

Ni sendis la oktobran numeron de «Esperanto Internacia» al ĉiu membro, ĉar ĝi enhavas la liston de la kotizoj por 1940. Notu, ke la kotizo MA estas malaltigita por kelkaj landoj, kun la espero, ke pli da membroj decidus ricevi la gazeton. Konforme, la kotizo por Patrono malaltiĝas en tiuj landoj, kaj ni esperas ke, en la nunaj krizaj tempoj, multaj helpos per Patroniĝo. Pro la malpli ofta apero kaj reduktita abonprezo de «Heroldo» ankaŭ la kotizo MAH estas grave malaltigita. Multaj MAH esprimis la deziron ricevi ankaŭ «E. I.», ĉar ĝia formato estas pli taŭga por konservado; ili povas ricevi ĝin je duono de la indikita abonprezo.

Ĉiu pagu la kotizon kiel eble plej frue, por ke ni sciu kiom da ekzempleroj de la gazetoj kaj jarlibro estos bezonataj.

La situacio por IEL tute ne estas malesperiga. Malgraŭ la kriza periodo de la tuta jaro, kaj malgraŭ la milito, la financa situacio en la fino de la jaro ŝajne estos pli bona ol en la komenco, dank' al la helpemo de kelkaj bonvolaj membroj kaj la subteno de la Esperantistaro ĝenerale. La daŭra subteno de niaj membroj povos certigi ne nur la ekziston de la internacia organizo kaj de «Heroldo», sed eĉ ke post la milito ni estos sufiĉe fortaj por fari la intensan propagandon, kiu sendube estos tiam ebla.

IEL : KOTIZOJ 1940

MEMBRO KUN JARLIBRO (MJ) ricevas membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron.

MEMBRO-ABONANTO (MA) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton « Esperanto Internacia » dum la jaro.

MEMBRO-ABONANTO-HEROLDO (MAH) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la gazeton « Heroldo de Esperanto » dum la jaro.

MEMBRO-SUBTENANTO (MS) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton « Esperanto Internacia ». Li afable pagas pli altan kotizon por helpi I.E.L. finance.

PATRONO ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan gazeton « Esperanto Internacia ». Li benvole pagas la dekoblan MA-kotizon por helpi al pli efika propagando internacia.

ENTREPRENO (Ent.) estas la nomo donita al firmo, hotelo, ktp., kiu subtenas la Esperantistan organizaĵon per pago de kotizo kaj rekompence rajtas ekspresigi anonceton maksimume 40-vortan en la Jarlibron. La kotizo estas egala kiel MA-kotizo.

EN LANDO, kies Landa Asocio aliĝis al I.E.L., estas alpagota la respektiva kotizo de la Landa Organizo.

Oni povas pagi kotizojn al Loka Deleĝito de IEL, al la Ĉefdeleĝito, al Landa Asocio, se tiu aliĝis al IEL, aŭ al la Centra Oficejo, **Internacia Esperanto-Ligo**, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

LANDO	VALUTO						Abono	Abono
		MJ	MA	MAH	MS	PATR.	E.I.	Heroldo
Argentinopesoj	3	7,5	11	20	75	5	8
Aŭstralioangl.ŝil.	4	8	13	20	80	6	9
Belgiujofrankoj	20	50	75	150	500	35	55
Brazilomilr.	12	35	50	100	350	25	38
Britujoŝil	*9	*13	*18	*30	*85	6	9
(* enhavas la kotizon al BEA).								
Bulgarujolevoj	80	200	330	550	2000	130	250
Danujokronoj	3.5	9	13	22	90	6	9.5
Estonujokronoj	2	6	11	20	60	4.5	9
Finnlandomarkoj	35	90	135	225	900	60	100
Francujofrankoj	*22	*60	*100	*200	*600	40	80
(* enhavas la kotizon al SFPE).								
Grekujodrakmoj	100	200	350	550	2000	125	250
Hungarujopenĝoj	4	9	14	26	90	6	10
Italujoliroj	14	35	54	100	350	24	40
Japanujoĝenoj	2.5	6	10	18	60	4	7.5
Jugoslavujodinaroj	30	90	130	250	900	65	100
Kanadodolaroj	1	2	3	5	20	1.25	2
Latvujolatoj	4	10	16	25	100	7	12
Litovujolidoj	5	12	21	36	120	8	16
Nederlandoguldenoj	1.5	3.5	5	9	35	2.5	3.5
Norvegiujokronoj	3	8	11.5	20	80	5.5	8.5
Nov-Zelandoangl.ŝil.	4	8	13	20	80	6	9
Portugalujoeskudoj	15	40	65	120	400	30	50
Rumanujoleoj	100	250	400	650	2500	160	300
Svedujokronoj	3	8	11	20	80	5.5	8
Svisujofrancoj	4	8	12.5	20	80	5	8.5
Turkujopiastroj	100	250	350	600	2500	175	250
Urugvajopesoj	2	5	8	15	50	3.5	6
Usonodolaroj	1	2	3	5	20	1.25	2
Aliaj landojangl.ŝil.	4	8	13	20	80	6	*—

(* abono je Heroldo kostas 3.50 ned. guld.)

G. M. Hamaker :

La Granda Irantaro

Kvazaŭ Granda Irantaro, kies partojn formas la popoloj, la homaro marŝas supren, laŭ kruta, peniga vojo, plena de profundaj, al finfosto, kie ĝi sin ordigos unuece.

Tiu Unueco estos : La ĝenerala rekono, ne nur teoria sed ankaŭ praktika, de la fundamentaj egaleco, egalvaloro kaj egalrajteco de ĉiuj homoj sur tero.

Ni diras « fundamentaj » ! La rekono de ĉi tiuj egalecoj tute *ne ekskludas* la rekonon de *diferencoj*. Tiuj diferencoj tamen estos nur tiaj, kiajn la homo mem kaŭzas, per siaj naturo kaj faroj ; *ne* plu tiuj, kiujn aliaj homoj tirane altrudas per siaj malmodesteco, antaŭjuĝo kaj potencmisuzo.

Jes, la evolua irado kondukas la homaron al unueco.

De la antikvaj tempoj, kiam la tribo, komponita laŭ reala aŭ supozita parenceco, estis la plej granda grupo, en kiun homoj unuiĝis, dum juro kaj moralo validis nur por la kuntribanoj, la homaro movas sin daŭre, kvankam ne seninterrompe, antaŭen sur la vojo al tiu finfosto de Unueco.

« Ne seninterrompe. » La irantaro foje haltas, eĉ return-iras. Ni mem sendube nun spertas tion, en ĉi tiu tempo de senkompataj ekzistado-batalado kaj konkurenco, de naŭzaj persona kaj grupa egoismoj, de multspeca interna malunueco de la popoloj, de iliaj ŝovinismo, malfido kaj militoj, kaj de pliakriĝo de la ras-antagonismoj.

La kompreno ke la evolucia progreso ne okazas laŭ rekta linio ; la rekono ke momente ni eĉ return-iras, tamen ne devas malhelpi nin vidi la suprenirantan iradon de la homara evoluado, kiel la historio de Eŭropo ĝin al ni montras.

Jen serio da faktoj el tiu historio :

La komence etaj triboj, kies barojn formis la parenceco, unuiĝis al pli grandaj ; el ĉi tiuj kreskis la popoloj kaj ŝtatoj, kiuj nun jam unuiĝas en Ligon, dum la penso pri Ŝtato-Eŭropo jam ekĝermis.

Plue : Post jarcentoj, en kiuj sennombraj homoj estis neliberaj kaj senrajtaj, ekestis por ĉiuj la rajto de laŭvola dispono pri la propra korpo. Ja, unue estis abolita la sklaveco en Eŭropo, multajn jarcentojn poste ankaŭ la servuteco, kaj, denove jarcentojn poste, la blankulo abolis ankaŭ la sklavecon de la kolorhaŭtulo.

Plue : La altrudado de difinita religia kredo, kun malkaŝa uzado de ĉiaj potencrimedoj kaj devigmetodoj, devis cedi lokon al pli etikaj kaj egalecaj ideoj : La oficiala kredo-deviĝo malaperis.

Plue : Antaŭ tri cent jaroj la fama hollanda juristo Hugo de Groot iĝis famega, ĉar li trovis kaj priskribis la « Juron de la Popoloj », dum nun jam ekzistas « Ligo de la Popoloj ». (Estas speciale notinde, ke de Groot, tamen unu el la plej kulturitaj plej klarpensaj homoj de tiu tempo, ankoraŭ dubis, ĉu la de li trovita internacia juro devos validi ankaŭ por nekristanaj popoloj.)

Plue : Universala lingvo, de post la ĉirilata studado de Leibniz, Comenius kaj Descartes, dum tri jarcentoj ĉiam pli kaj pli fervore serĉata (vane nur pro la egeco de la tasko) fine naskiĝis. Esperanto ekzistas.

Plue : La granda franca revolucio alportis egalecon de ĉiuj rilate al la Leĝo ; cent jarojn poste la amerika profeto Edw. Bellamy, en sia verko « Ĝegaleco » (Equality) antaŭdiris i. a. egalecon de ĉiuj rilate

al la Laboro, kaj nun, denove kvindek jarojn poste, jam ekzistas novaj societ-formoj kaj reĝimoj, kiuj havas ĉi tiun egal-econ en sia programo kaj aplikas ĝin.

Plue : Antaŭ tri cent jaroj la mezklasulo trovis tute normala la teruran arogantecon de la altklasuloj ; antaŭ cent jaroj li ankoraŭ toleris ĝin kvankam grumblante, dum nuntempe, se esceptokaze li ankoraŭ spertas tian agmanieron, li kolere respondas aŭ priridas ĝin.

Plue : La pozicio de la virino en la familio kaj en la socio, konstante kaj rapide progresas al kompleta egalrajteco kun la viro.

Fine : La Oriento vekigis, kaj la kolor-haŭtuloj proklamas, kaj parte ankaŭ jam montras, sian rajton al egaleca pozicio en la blankula mondordo.

Vere, la Historio parolas klaran parolon ! La nomitaj okazintaĵoj kaj fenomenoj estas same multe da mejlŝtonoj, kiuj

klare indikas la, en la jarcentoj, jam trairitan vojon al la finfosto de Unueco !

Ĝi jam ekzistas, tiu unueco, en materia senco ! La mirakle rapidaj progresoj en la laste pasinta duonjarcento, sur scienca, teknika kaj mekanika terenoj, neniigante distancojn kaj ĉien transplantante la okcidentan civilizacion, havigis grandan antaŭecon al la materia evoluado kompare al la spirita, etika.

En materia senco, la homaro do jam formas Unuaĵon, sed alisence ĝi estas ankoraŭ tute same malunueca kiel antaŭ kvindek jaroj.

Ĉu ne estas klare, ke universala helpingo, pro sia *unuiga forto*, estas urĝe necesa helpilo por plua homara evoluado ; ke estis la evolucio mem, kiu, uzante Zamenhof kiel ilon, naskis Esperanton, ĉar ĝi nepre bezonas ĝin ?

Vere, ni esperantistoj ne maltrankviliĝu pro la ĉi-momenta malrapida progreso de

Deviga instruado de Esperanto en ŝtata instituto brazila

La Konsilantaroj de Geografio kaj Statistiko, kiuj konsistigas la Brazilan Instituton de Geografio kaj Statistiko, senpere dependantan de la Prezidanto de la Respubliko, efektivas ĉiujare ĝeneralajn kunvenojn. Sekve de la lastjare aprobita rezolucio alpreni Esperanton kiel helpingvon de la Instituto kaj sekve de la eldono de Statistika Resumeto, la Konsilantaro de Statistiko, en sia kunveno de la 19-a de julio, aprobis la jenan rezolucion, kies propono estis prezentita de D-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto :

REZOLUCIO N-ro 128.

Paragrafo 1. — La lernado de Esperanto estos deviga instrutemo de la teoria-praktika kurso ĉiujare farata de la Instituto por la praktikantoj de la ŝtata statistik-servo.

Paragrafo 2. — La Ĝenerala Sekretariejo organizos la programon de tiu lernado, prizorgante ke, orientita de kompetentaj instruistoj, ĝi estos praktika kaj efika.

Paragrafo 3. — La Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko prezentas siajn plej korajn dankojn al Brazilia Ligo Esperantista kaj aparte al ties prezidanto, D-ro Couto Fernandes, pro lia konstanta kaj efika kunlaborado por utiligo de Esperanto kiel helpingo de la brazila statistiko.

Rio-de-Janeiro, 19 julio 1939 (kvara jaro de la Instituto).

Alberto Martins, ĉeestanta sekretario de la kunveno ;

M. A. Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto ;

José Carlos de Macedo Soares, prezidanto de la Instituto kaj de la Konsilantaro.

Ferio en Italujo

Por mi, fer'io en Italujo estis neebla, precipe, kompreneble, pro la kosto.

Sed ĉi tiun jaron, tio, kio estis neebla, ebligis! Oni sciigis min ke mi gajnis premion en la kvina itala rad'io-konkurso, kiu konsistis en senpagaj hotelkuponoj por dek tagoj en Italujo kaj duaklasa ira-revena bileto fervoja, de la itala landlimo al Roma.

Mi ekkaptis mian bonŝancon ambaŭmane, kaj vojaĝis Italujon je pentekosto.

En Torino mi renkontis D-ron Borione kaj du aliajn geesperantojn, sed pro la malfrueco de la vagonaro ni povis interparoli nur dum mallonga tempo.

La « Esperanta Voĉo » (de la Itala Radio) kaj lia ĉarma edzino renkontis min ĉe la stacio en Roma kaj certigis ke mi estis tute « hejme » dum mia restado tie.

Ferio en tiel belega lando kiel Italujo ĉiukaze devas esti feliĉa ferio; sed por mi ĝi estis neforgesebla sukceso, pro la gastameco kaj amikeco de la « Esperanta Voĉo » kaj lia edzino.

Kun ni viziti kelkajn interesajn lokojn en Roma kaj Ostia (la Roma « Lido »). Ni ankaŭ havis treege interesan vesperon

nia kara lingvo, malhelpita de *transiraj* politikaj cirkonstancoj.

La troa naciismo, kiu, kompreneble, kontraŭstaras internacian lingvon, estas necesa por refari unuajojn el la dispecigitaj nacioj, disfalintaj pro la tro malegalaj vivcirkonstancoj de la nacioj; sed ĝi ne povas esti ĉiamdaŭra, ĝi malaperos post plenumado de sia tasko. Tion garantias la historio de la homara evoluo!

La interne reunuiĝintaj popoloj rearanĝos sin en irantaron, kaj la Granda Irantaro reprenos sian marŝadon al la finfosto de Unueco!

La mondo baldaŭ sopiros nian belan unuigan ilon. Ni simple bontenu kaj poluru ĝin, por ke ĝi estu preta kiam ĝi estos urĝe bezonata!

kun la lokaj samideanoj, trinketante nigran kafon. En Roma, oni aranĝis por mi ankaŭ aŭdiencon kun la sankta Patro, Papo Pius XII-a, — vere memorinda kaj tre feliĉa okazo.

Post tritaga restado en Roma mi iris al Napoli kaj pasigis tie du tagojn; poste mi restadis du pluajn tagojn sur la mirinda insulo Capri. Kiom oni dezirus resti tie, ĉiame!

Fine mi reiris al Roma, vizitante Pompei dumvoje, kaj post tri pluaj tagoj en la Eterna Urbo mi vizitis Genova. De tie mi iris hejmen — kun bedaŭroj sed ankaŭ kun multaj tre ĝojigaj memoraĵoj.

Mi ofte miris pri la gastameco kaj amikeco ne nur de niaj italaj samideanoj sed de ĉiuj personoj kiujn mi renkontis. Ekzemple, kiam, estante en Napoli, mi volis fotografi grandan militŝipon en la haveno, — oni ja ne permesis tion; sed ĉu ili forsendis min kun malplenaj manoj? Ho ne! Oni kondukis min sur la militŝipon kaj tie donis al mi poŝtkartan fotografajon de ĝi! Vere, amikeco, ĉu ne?

En Roma, la « Esperanta Voĉo » akompanis min al la ENIT-oficejo; tie ni renkontis la direktoron kaj aliajn personojn, kaj mi ricevis kelkajn memoraĵojn de mia vizito.

Pasante, estas interese noti, ke la « Esperanta Voĉo » ricevas ĉiujare pli multe da korespondadoj ol ĉiuj aliaj turismaj parolistoj kune! Ni daŭrigu tian bonan rekordon!

Tamen, fine finiĝis mia mirinda ferio. Nun mi nur atendas la tempon, kiam mi povos reiri... Kiam? Mi ne scias. Mi nur scias, ke mi absolute devas reiri al tiu belega Italujo.

Al la « Esperanta Voĉo » kaj lia ĉarma edzino, kaj al ĉiuj italaj samideanoj, mi sendas miajn plej korajn dankojn kaj salutojn. — sed nur, mi esperas: ĝis revido!

Peter A. RODGERS.

LA PLEJ NOVA LINGVO EN LA PLEJ MALNOVA ĴURNALO

MIA KVINJARA ESPERANTA LABORO POR LA « OPRECHTE HAARLEMSCHE COURANT ».

Antaŭ mi kuŝas la lastaperinta numero de ĉi tiu fama kaj konata nederlanda ĵurnalo. Fiere paradas la numero de la nuna jarkolekto, nome : 284 ! Jen la plej malnova ĵurnalo de la mondo ! Ŝajnas ke ekzistis antaŭ miloj da jaroj en Ĉinujo io kio iomete similis niajn hodiaŭajn ĵurnalojn. Sed laŭ la ideoj, kiujn ni nun havas pri ĵurnalo (ĉiutaga apero, kun novaĵoj kaj artikoloj) la supre nomita estas vere la unua efektiva ĵurnalo.

Demandu en Nederlando iun ajn lernanton de la unuagrada lernejo : « Kiu estas la plej malnova ĵurnalo de l'mondo ? », kaj li senhezite respondos : La « Oprechte Haarlemsche Courant ! »

Kiam antaŭ preskaŭ tri jarcentoj en Amsterdam kaj aliaj mondurboj ankoraŭ ne aperis kaj ekzistis iu ajn presita kaj publika interkomunikilo, oni portis la O.H.C. piede per malgranda veturilo al Amsterdam. Eĉ en la eksterlando oni legis ĝin. Dum la franca superregado ĝi aperis en la nederlanda kaj franca lingvoj. Faksimilon de unu el tiuj ekzempleroj mi posedas.

Daŭris nur mallonge, kaj ankaŭ aliaj komencis eldoni proprajn ĵurnalojn. Pro tio la eldonistoj de la O.H.C., kiu ĝis tiam estis nomita nur « Haarlemsche Courant », aldonis la adjektivon « Oprechte », kiu signifis : « sincera » aŭ « efektiva ». Malgraŭ tio, iom post iom ekaperis en nia lando kaj tra la tuta mondo multaj novaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

Tamen Haarlem, la urbo de Laurens Janszoon Coster (laŭ mi la inventinto de la presarto) havas la honoron, ke inter ĝiaj muroj aperis la unua taŭga, imitinda ĵurnalo, kiu do estis la antaŭulo de ĉiuj ceteraj !

Nu, la iama infano vivas ankoraŭ ; sed ne nur tio : ĝi plenkreskis kaj — modernigis ! Pruvo por ĉi tiu lasta aserto estas ke jam antaŭ multaj jaroj la direkcio disponig's lokon por Esperanto-rubriko. Dum kelkaj jaroj oni ĉesigis tiun rubrikon (mi ne scias kial), sed la lastajn kvin jarojn mi havas la honoron prizorgi ĝin. Mi diras « honoron », ĉar laŭ mia opinio efektive estas honoro labori por la plej nova lingvo en la plej malnova ĵurnalo.

Mi verkis ĉi tiun artikoleon pro tri kaŭzoj : Unue, mi volas montri ĝin post apero en E. I. al la gvidantoj de la O.H.C., do por fari propagandon tie. (Eble ankaŭ aliaj Esperanto-gazetoj represos ĝin; sendu tiukaze eltondaĵon al mi !) Due, mi esperas ke, ekzemple, kvin personoj el la tuta mondo sendos al mi malgrandan leteron, por ke mi povu ankaŭ ilin montri al la direkcio de O.H.C. Trie, mi petas la legantojn sendi al mi, se eblas, kliŝojn pri interesaj okazintaĵoj en Esperantujo, por ke mi havu senpagan materialon por ilustrii miajn artikolojn. Post uzado vi mem ja ne plu uzas ilin, ĉu ne ? Kaj mi ne povas postuli tro multe de la donacemo de l'ĵurnalo mem. Mia adreso : G. J. Bontje, Bloemveldlaan 16, Haarlem, Nederlando.

B.

PLI MALBONE.

Peĉjo iras la unuan fojon en la lernejon. Dum la paŭzo li ekploregas.

— Kial ci ploras ? demandas la instruisto.

— Oni rakontis al mi, ke mi devas ĉi tie resti ĝis mia dekkvara jaro.

— Sed tial ci ne bezonas plori, bubo ! Mi mem devas ĉi tie resti, ĝis mi estos 65-jara.

IDEALOJ.

— La virina idealo de vi viroj estas kolombo kun ĉiuj ecoj de labor-abelo.

— Guste, — kaj la vira idealo de vi virinoj estas leono kun ĉiuj ecoj de ŝafo.

Kie suno lumas nokte...

« Finna Turismo Esperanta » fondita.
Popola Turisma Oficejo uzas Esperanton.

Kune kun la denova vigla progreso de la Esperanto-movado en Finnlando graviĝis samtempe la demando pri la turisma servo. Sub tiu ĉi influo la centraj Esperanto-organizaĵoj, neŭtrala kaj laborista, decidis reorganizi la agadon en la lando per fondo de turisma komisiono. Nun ĝi estas fondita sub la titolo « Finna Turismo Esperanta » (adreso: Kluuvikatu 5. A., Helsinko, Finnlando). Ĝi celas daŭrigi la laboron de la iama Finna Turismo, kiu siavice laboris dankinde, sed fine, pro manko de laborfortoj, nur vegetis. La ekfunkcia komisiono havas ankoraŭ malfacilan laboron, sed iom post iom ni esperas prezenti al la eksterlandaj samideanoj la plej kontentigajn vojaĝeblecojn en nia lando per helpo de Esperanto.

Ĉar la komisiono estas subtenata nur de malriĉaj asocioj, al ĉiuj demandoj kaj informpetoj oni bonvolu aldoni respondoponon.

★

Antaŭ nelonge estis fondata en Finnlando Laborista Turisma Ligo (Työväen Matkailuliitto), kiu kunage kun la ŝtataj fervojoj, ŝipaj asocioj kaj Finna Turisma Societo starigis specialan Popolan Turisman Oficejon (Kansan Matkatoimisto). Ĝi kunlaboras kun la respondaj skandinaviaj turismaj oficejoj.

Ci tiu Popola Turisma Oficejo (adreso: Kansan Matkatoimisto, Paasivuorenk. 3, Helsinko), uzas en sia korespondado ĉiujn grandajn eŭropajn kulturlingvojn, inkluzive de Esperanto.

La nomita oficejo dissendis esperantlingvan prospekton, en kiu ĝi atentigas pri la allogaĵoj de Finnlando: ĝiaj multnombraj lagoj kaj insuloj, ĝiaj virgaj arbaroj, ŝaŭmantaj akvofaloj, ĝia laborema, modesta loĝantaro. « En Finnlando oni povas vojaĝi laŭ bonaj landvojoj ĝis la bordo de Glacia Maro. Somere la suno estas videbla tra la tuta nokto. »

La 19-a SAT-Kongreso

Ĝi okazis dum la dua semajno de aŭgusto en Kopenhago kaj estis ĝenerale granda sukceso. Alĝis al ĝi 622 kongresanoj el 15 landoj, kaj efektive ĉeestis 568 el 13 landoj.

Sabaton, 5.8., vespere okazis la Solena Malfermo, kiu parte estis disaŭdigata per radio, precipe la parolado de la dana ministro por klerigo, s-ro Jorgensen (liberalulo), la salutparoloj de la Plenumkomitato de SAT kaj tiuj de la diverslandaj reprezentantoj. Estis praprezentata ĝaz-oratorio, speciale verkita por la Kongreso.

Dimanĉon posttagmeze estis organizita propaganda manifestacio en la Popola Parko, kaj vespere la Interkonatiga Vespero.

Dum la sekvintaj tagoj okazis kvar laborkunsidoj, oficiala akcepto en la Urbdomo, politika diskutvespero (cetere tute harmonia), ktp.

Gvidrezolucio, akceptita dum la Kongreso, konkludas jene: « SAT agos do ankaŭ estonte pionire sur la kultura tereno, sur la klasa bazo, edukante kaj klerigante siajn anojn, por ke ili iĝu la plej valoraj kaj plej konsciaj membroj de nova homaro, libera de antaŭjuĝoj kaj subpremo, dank' al la konstanta utiligado de Esperanto. »

Aperis ĉiutaga kongresa gazeto, la unuan fojon en la historio de la SAT-kongresoj. (Ĝis nun simila eksperimento estis farita nur unufoje, okaze de la 15-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg 1923; tiam « Heroldo de Esperanto » aperis kiel ĉiutaga kongresa gazeto.)

La Kongreso finiĝis, post ŝipekskurso, en Malmö, sur sveda teritorio.

La 20-a SAT-Kongreso estas invitita por 1940 al Nancy (Francujo).

Ni funebras

— Kapitano C.B. MORGAN, IEL-delegito en Brightonsea, Anglujo, mortis la 19-an de aŭgusto. Li multon faris por nia movado en la orienta parto de la lando kaj atingis aĝon de 76 jaroj. — Li ripozu pace!

Esperanto vivas en la Nordo kaj en la Sudo



De maldekstre: 1. S-ro Niels V. Sørensen en Gredstedbro-St. (Danlando), IEL-delegito, nova sed tre fervora samideano, kiu lernis nian lingvon bonege dum ok monatoj kaj jam sukcese plenumis la duagradan ekzamenon. — 2. Ĉi tiuj gesamideanoj el Maroko ja povas ridi, ĉar la foto estas prenita dum ekskurso. La sinjorino maldekstre estas nia kunlaborantino Irène Fink el Casablanca. — 3. Tiu ĉi sinjoro skribis sian nomon sur la nigra tabulo. Li estas Cseh-instruisto, s-ano J. Crnstein el Nederlando, kiu dum la lastaj du jaroj gvidis kursojn en diversaj urboj kaj distriktoj de Norvegujo. Ankaŭ lia edzino, s-ino Elvira Ornstein, estas Cseh-instruistino. Pasintan vintron ŝi gvidis sukcesajn kursojn en Porsgrunn kaj Skien. Rezulte de ilia laboro jam fondiĝis pluraj novaj Esperanto-kluboj, kaj Norvega Esperantista Ligo gajnis multajn novajn anojn.

Hungara Esperanto-Kongreso

La 13-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso okazis la 14-16.8. kun bona sukceso en Budapeŝto. Sufiĉe multe da partoprenantoj kunvenis, kaj ankaŭ gravaj deputitoj estis senditaj por saluti la kongreson. Ekz. la Ligo de Sociaj Societoj sendis ministran konsiliston Ivan Jánosfi Jankovich, kiu per bela hungara parolado klarigis la pravecon de la Esperanto-movado kaj gratulis Hung. Esp.-Federacion pro la farita bona laboro.

La malferman paroladon faris Julio Baghy, kiu estis ankaŭ farinta la tutan preparan laboron. Laŭ propono de J. Mihalik oni elektis s-ron Baghy prezidanto de la kongreso; kunprezidantoj estis D-ro F. Erdey, J. Mihalik, ĉefsekretario Alf. Pechan, sekretario Margareto de Szabó. S-ro Mihalik faris interesan raporton pri la Berna mondkongreso, fiksita ke IEL faras

bonan laboron, kaj konstatis ke la mondkongreso same opiniis kiel laboras HEF: enkonduki Esperanton en ĉiun praktikan terenon, por ke ĉiu havu la neceson proprigi ĝin. S-ro Pechan faris gravan proponon pri la instruado de Esperanto en hungarajn lernejojn, kaj oni decidis ke la kongreso deputacie petu la ĉefurbon kaj la kultregistaron por enkonduki provkursojn esperantajn antaŭ ol instrui fremdan lingvon. J. Baghy faris proponon pri organizo de hungarlanda laborista-esperantista movado, kiun oni akceptis. La kongreson salutis la kultministro letere, P. Balkányi en nomo de IEL, ktp.

Antaŭ la solena kunsido okazis la skribaj ekzamenoj, post la kongreso la pervorta; sukcese plenumis la ekzamenojn 13 personoj, kiuj ricevis diplomon A aŭ B.

La 15.8. okazis gaja komuna vespermanĝo, kiun partoprenis multaj malnovaj esperantistoj, kaj montriĝis ke en Hungarujo estas esperebla forta movado, se la esperantistoj diligente propagandos.

POSTKONGRESA SEMAJNO SUR HERZBERG

La postkongresa semajno sur Herzberg en Svislando havis neatendite bonan sukceson. Estis 40 gekursanoj kaj 60 interesigantoj, entute du centoj da personoj el ok landoj. Dum la semajno nia franca samideano Roland Dupuis donis du kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj, faris du paroladojn (pri Esperanto-literaturo kaj pri la franca provinco Bretonlando) kaj prizorgis la diversajn distrajn aranĝojn, je la invito de s-roj D-ro F. Wartenweiler kaj Walter Kobelt. Pro la bona sukceso oni intencis reokazigi similan aranĝon en la venonta jaro; sed provizore oni devas atendi la evoluon de la politikaj aferoj. S-ro Dupuis nun troviĝas en Svedujo, same kun la celo propagandi kaj instrui Esperanton.

★

ESPERANTO PROGRESAS EN NORVEGUJO

La ĝustecon de tiu ĉi frazo pruvas diversaj informoj pri la stato de la enlanda movado, kiujn oni ekhavis okaze de la lasta jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo, en Sauda.

Rilate la membronombron la progreso dum 1938 estis rimarkinda. La nombro de kluboj aliĝintaj kreskis per 20 %, kaj la membro-nombro per 24 %, la plej granda kresko dum multaj jaroj. Oni ankaŭ rimarku, ke dum 1937 estis 13 el la aliĝintaj kluboj kiuj dum la jaro perdis pli multajn membrojn ol ili ekhavis. Dum 1938 tio okazis nur al 9 kluboj. Ankaŭ en aliaj rilatoj la statistikoj de NEL montras pli grandan progreson ol antaŭe. Tie ĉi ni menciuj, ke kvankam NEL gajnis la unuan Internacian Konkurson de IEL per 660 v., ĝi dum 1938 plibonigis sian staton je pliaj 34 %.

La detalaj raportoj de la kluboj, kiuj cetere estas pli konsciaj rilate la raportadon, ol ili estis antaŭe, montras ke la kluboj ĝenerale pli bone laboris, kaj ili sekve povas montri pli bonajn rezultojn. Interese estas, ke la kluboj perdis proporcie malpli multajn membrojn dum 1938 ol dum la du antaŭaj jaroj.

Por instigi al studado, NEL petis ĉiujn klubojn starigi studrondojn. Multaj faris tion, kaj la rezultoj ne estas malbonaj.

Kiel dum antaŭaj jaroj, la propaganda laboro de la Gazetara Komitato montris progreson. Dum 1938 ĝi registris 2400 aperigojn en kaj pri Esperanto, kontraŭ 2000 lastjare.

« ESPERANTO-POKALO 1939 ».

135 esperantistoj el diverstendencaj grupoj en Amersfoort (Nederlando) disponigis belan pokalon por *naĝkonkursoj* en tiu urbo. La konkurso okazis sub aŭspicio de Nederlanda Asocio por Savado de Dronantoj, brigado Amersfoort, okaze de la 20-jara ekzistado.

La nomo de la pokalo estas « Esperanto-Pokalo 1939 ». Verda stelo estas ligita al la sokleto de la supra figuro (naĝanto). La donaco estas publikigita en la programoj de la konkursoj. Kune kun kelkaj aliaj oni montris la gravan premion en butikoj de sportaj artikoloj en la centro de Amersfoort. En la festa vespero, la urbestro, lia grafa moŝto Mr. J. C. van Randwijck, donis la diversajn objektojn al la gajnintoj. Enmanigante la Esperanto-pokalon, li klarigis la rilatojn inter esperantistoj kaj naĝantaj savantoj jene: « La esperantistoj volas savi la homaron el la lingvo-maro, en kiu ĝi preskaŭ dronas, dum vi havas la konvinkon, ke vi devas eduki la anojn al spertaj savantoj de efektivaj dronantoj. Jen la kaŭzo, kial la disĉiploj de D-ro Zamenhof instigas vian laboron per ĉi tiu grava donaco. Ili sentas sin viaj parencoj. »

La pokalon gajnis la Amersfoort'a brigado. Sino J. Koopmans-Nauta, del. de IEL, estas la iniciatinto de ĉi tiu efika propagando, pri kiu la regionaj gazetoj raportis.

Brigado Amersfoort de la naĝantaj savantoj tenos la Esperanto-pokalon nur dum unu jaro. Post tiu tempo ĝi denove disponigos la premion ktp., ĝis kiam iu grupo estos gajninta la pokalon trifoje sinsekve aŭ kvinfoje entute. Tiel la propagando daŭros plurajn jarojn.

★

NOVA ADRESO DE E.C.I.

Por la praktika aplikado de Esperanto en la turismo, Itala Esperanto-Federacio malfermis jam en la jaro 1931 taŭgan oficejon en la centra parto de la urbo Milano, sub la nomo « Esperanto-Centro Itala ». Naŭ karavanoj al Italujo kaj al eksterlando estis organizitaj; plie la oficejo prenis sur sin la gravegan taskon de la organizo de la 27-a Universala Kongreso de Esperanto kaj de ĉiuj turismaj aranĝoj al ĝi rilatantaj.

Nun, pro la malfacilaj ĝeneralaj kaj valutaj, mankas entute la precipaj kialoj de plua ekzistado de tiu oficejo; la oficejo mem, do, estas nur lukso kaj necesa elspezo, por la normalaj agado kaj administrado de la Federacio; tial tiu lasta rezignis provizore je la oficejo, daŭrigante sian poresperantan laboron pere de siaj estraro, sekretario kaj delegitoj. Bonvolu noti ke la nuna *boŝta adreso* de Itala Esperanto-Federacio kaj de la gazeto « L'Esperanto » estas: Esperanto-Centro Itala, Casella Postale 960, Milano.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO ATINGAS MATURECON

En 1918 naskiĝis nova infaneto, nomita Skolta Esperantista Ligo, en la ruinigita vilaĝo Ransart, Nord-Francujo. La fiera patro, A. W. Thomson, alie konata laŭ la nomo « Avoto », estis brankardisto, kiu humile penis helpi la vunditojn de la milito, kaj la unuaj sonoj en la oreloj de la nova paciganteto estis la tondro de kanonoj.

Ĉi tiun jaron la tiama infano fariĝas maturulo. Ĝi estas oficiale reprezentata en tridek landoj kun, plie, unuopaj membroj en kelkaj aliaj. Dum la 21 jaroj de sia vivo SEL organizis 11 internaciajn tendarojn, kaj ankaŭ okazis kelkaj aliaj kunvenoj de esperantistaj geskoltoj; dum jamboreoj, Universalaj Kongresoj ktp.

La celoj de SEL estas : 1. disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto, 2. disvastigi Esperanton inter la ĉiulandaj geskoltoj, 3. krei skoltan literaturon en Esperanto, 4. eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon, kaj 5. solidariĝi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter la diversnaciaj junuloj.

Menciinde ankaŭ estas, ke SEL havas apartan skoltinan fakon kun propraj reprezentantoj en dek-unu landoj. Tamen, la ligo estas nur unu organizo, kaj plene kunlaboradas en ĝi skoltinoj kaj skoltoj el preskaŭ ĉiuj mondpartoj.

Specimenan numeron de « Skolta Bulteno » volonte sendos laŭpete la Redaktoro : 65, Tud-denham Road, Ipswich (Suffolk), Anglujo.

B.E.A.-Gazetservo.

★

LA JUNULARKUNVENO EN TERVUREN

La 2-a Internacia Junular-Kunveno de Tutmonda Junular-Organizo okazis de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto en Tervuren, apud Bruselo, Belgio. En ĝi partoprenis 350 gejunuloj de 10 diversaj nacioj. La kunveno fariĝis grava sukceso.

Festante la junularo trapasis la kunvenon. Ili faris promenadojn; kantis, naĝis; ludis teatraĵojn aŭ faris ekskursojn.

Sabaton, la 12-an de aŭgusto, estis la jarkunveno de T.J.O. La tagordon de ĉi tiu laborkunveno oni regule pritraktis. La diversaj raportoj estis aprobataj. Vaste oni preparolis la propagandon. Montriĝis, ke jam en diversaj landoj oni faris projektojn por eldoni nacilingvan propagand-organon. La estraron oni denove elektis. Al ĝi oni aldonis s-ron J. Kars el Leerdam, Nederlando. Post iom da diskutado oni elektis Francujon kiel kongreslandon 1940. La por nia

movado historia urbo Bulonjo apud Maro tiam gastigos la tutmondan Junularon.

La oficiala festvespero estis beleĝa. Ĝin vizitis la aŭtoritatuloj el Tervuren, kaj la Belga Radio Asocio N.I.R. elsendis parton de la programo.

Restis unu tago, kaj for estis la 2-a Internacia Junular-kunveno. La junularo iris hejmen. Kun forta volo en la koro por labori por nia Zamenhofa idealo.

Ĉi tiu kunveno denove montris, ke la gejunuloj ŝatas Esperanton, ke ili plene komprenas nian idealon. Tutmonda Junular-Organizo povas esti kontenta pri la laboro de la unua jaro. Ĝi estis, kio ĝi volas esti: organizo, kiu edukas la junulojn en Esperanta sfero, por ke ili, plenkreskaj, estu pretaj por subteni aŭ transpreni la laboron de la nunaj plenkreskuloj.

Informojn pri la Esperanto-Junular-laboro donas la T.J.O. — sekretario: Lingestraat 11, Leerdam, Nederlando.

★

PROF. D-ro A. F. HOLLEMAN 80-JARA

Konata nederlanda profesoro kaj esperantisto, s-ro D-ro A.F. Holleman, festis la 28-an de aŭgusto la 80-an datrevenon de sia naskiĝo. Ankaŭ al ni, esperantistoj, decas atenti pri tiu ĉi jubileo kaj gratuli ĉi-okaze tiun ĉi eminentan kemiiston, kiel scienculon kaj samideanon. En memoriga artikolo pri Prof. Holleman en « Chemisch Weekblad » (Kemia Semajngazeto), Prof. J.P. Wibaut skribas:

— En la libroŝranko de la ĉambro de Holleman en la laboratorio oni povis ekkoni alian flankon de lia personeco. Ie apud vico da vortaroj staris romano de franca aŭtoro en esperanta traduko. « Ĉi tiun verkon mi legas por plu ekzerci min en Esperanto », klarigis Holleman al mi, « post kelka studo oni baldaŭ kapablas legi kaj verki en tiu lingvo. » Laŭ sia propra diro, en artikolo pri Esperanto en la « Vakblad voor Biologen » (Faka Gazeto por Biologoj) de marto 1922, Holleman jam en sia studenta tempo interesiĝis pri la enkonduko de internacia lingvo. Efektive li ĉiam estis internacie orientita, kaj li havas amikojn en ĉiuj landoj, kie oni sin okupas pri kemio. Eĉ nun ankoraŭ, en sia alta aĝo, li reprezentas nederlandajn sciencajn instituciojn en multaj internaciaj kunvenoj. La internacia pozicio, kiun Holleman okupas, estis ankaŭ grava faktoro por tio, kion li atingis ĉe la regulado de la organike kemia nomenklaturado.

Multajn jarojn ni trovis la nomon de Prof. Holleman inter la membroj-subtenantoj de UEA. Tiel li montris sian intereson pri kaj helpis al nia movado. Al ĉiuj gratuloj, bondeziroj kaj dankesprimoj, kiuj jam atingis lin de multaj flankoj, ni — esperantistoj — aldonu la niajn.

W. P. ROELOFS.

INTERNACIA KUNVENO DE ABSTINAJ ESPERANTISTOJ

Dum la bone sukcesinta tutmonda kongreso de kontraŭalkoholismo, kiun partoprenis 700 personoj, inter ili 500 eksterlandanoj, okazis ankaŭ kunveno de abstinaj esperantistoj, la 30-an de julio en Helsinko. La kunvenon bonvenigis magistro Vilho Setälä. Instruisto Mikkola alportis salutojn de la organiza komitato de mondkongreso de bontemplanoj 1940 kaj raportis ke la kongreso certe uzos ankaŭ Esperanton. Instr. Rasku prelegis pri la devoj de Zamenhofa ideo kreskigi bonajn homojn sen alkoholo, tabako ktp. Poste instr. Mikkola legis kelkajn belajn fragmentojn el la noveloj de fama finna verkisto Johannes Linnankoski, de li esperantigitajn. Siajn salutojn el kvin diversaj landoj prezentis kelkaj ĉeestantoj. Staciestro Salokannel faris paroladon pri la utileco de nia lingvo por kontraŭalkohola movado kaj por la ĉiujaraj jam multcentaj internaciaj kongresoj. Multaj finnoj propagandis per nia lingvo por abstinco preskaŭ tra la tuta mondo, kaj en Finnlando aperis la unua lernolibreto pri abstinco, verkita originale en Esperanto. La kongresoj ne estos plu tiel longegaj kaj malagrablaj, se oni enkondukos nian lingvon. Nun kiam oni estas devigita uzi diversajn lingvojn, oni eĉ ne emas aŭdi ĉiujn prelegojn, ĉar nur malmultaj bone komprenas ilian enhavon. Specimenoj de lernolibreto kaj organo de finnaj bontemplanoj estis disdonitaj al la ĉeestantoj. La organo, nomata « Raittiuskerho » (abstineca cirklo) enhavas Esperantofakon, kaj la disdonita numero enhavis bildon de la ŝtatprezidanto Kyösti Kallio, konata abstinulo. Skribajn salutojn de diversaj landoj laŭtlegis mag. Setälä, kiu kore dankis la ĉeestantojn kaj finis la sukcesintan kunvenon.

Post la kunveno la ĉeestantoj veturis al insulo Seurasaari por rigardadi la etnografian muzeon, kiu ilin tre interesis. Estas nur esperinde ke la abstinaj esperantistoj pli ofte havu similajn kongresetojn kaj starigu por si esperantan gazeteton. Nia devo ja estas ĉiumaniere utiligi Esperanton, tio estas unu certa vojo al la fina venko de nia lingvo.

ABSOLUTISTO.

★

IEL KAJ SAT

Organiza Kongresa Komitato de la 19-a SAT-Kongreso en Kopenhago petas nin publikigi la jenon :

En la raporto pri la Berna Kongreso, presita en « Heroldo » n-ro 30-31, oni dufoje aludas al telegramo « de la SAT-kongreso al la kongreso de la neŭtraluloj ». Ambaŭfoje la teksto estas tiel redaktita ke la leganto akiras la impreson,

ke la kongreso de SAT decidis sendi saluttelegramon al Berno (pri kio unu el la diskut-partoprenantoj en Berno tiris konkludon favoran al la unuiĝo kun IEL). Tio estas neĝusta ! La kongreso de SAT ne estis konsultita en tiu afero (cetere en si mem ja neebloja, ĉar la SAT-kongreso okazis post la Berna Kongreso).

Temas pri la jeno : La Organiza Kongresa Komitato de l' SAT-kongreso sendis kelkajn tagojn antaŭ nia kongreso saluttelegramon al la Berna Kongreso. Tiu geston de nia flanko oni ne uzu kiel bazon por tro vastaj konkludoj. La LKK de la Berna Kongreso montris la grandan komplezon permesi al ni, ke estu almetita al la Berna kongresdokumentaro invito al nia kongreso. Tiu afabla sinteno al ni igis natura de nia flanko (do f'anke de la kongreskomitato!) fari paŝon de gentilo kaj amikeco. —

Al tio la verkinto de la kongresraporto pri Bern, kiu aperis ankaŭ en « Esperanto Internacia », permesas al si aldoni :

En mia raporto mi fakte unufoje (ne dufoje) erare skribis pri telegramo de la SAT-kongreso (anstataŭ de la kongresa komitato) al la Universala, kaj du aliajn fojojn menciis pri telegramo de SAT (ne SAT-kongreso). Sed nenie mi tiris, kaj ankaŭ en Bern neniu tiris, konkludon favoran al unuiĝo de SAT kun IEL. Jes oni ĝenerale aplaŭdis la telegramon de SAT, kiel signon de samideana (pri Esperanto) amikeco, kaj oni akceptis en Bern ĝeneralan rezolucion de danko, kaj pri kunlaborado por difinitaj celoj kun ĉiuj asocioj kiuj utiligas Esperanton por iu ajn celo, kiam tiu kunlaborado ne kontraŭstaras al la neŭtraleco. Koncerne la eraron en mia kongresraporto mi petas pardonon, kaj koncerne kunlaboradon mi supozas ke tamen foje ĝi ebligos por difinitaj celoj, ĉar — unu celo ja estas al ni komuna : la enkonduko de Esperanto !

ŜANĜO DE AERO.


La maljuna, preskaŭ 80-jara marveterano Vesterman ricevas viziton de kelkaj sinjoroj el la urbo, kiuj ekskursis al lia fora insulo. La societo ekhaltas tamen iom hezite ĉe la pordo. La aero en la malvasta ĉambro estas sufoka kaj tre malbonodora, kaj ŝajne la loĝejo ne estis aerumita dum jaroj.

Unu el la sinjoroj diras :

— Sed, kara paĉjo, ĉu vi do ne kutimas malfermi fenestron por ricevi iom da freŝa aero ?

La maljunulo mire rigardas lin kaj respondas :

— Ne-he, tion mi ne kutimas. Sed anstataŭe mi kutimas fumi pipon da tabako, kiam mi deziras ioman ŝanĝon de aero !



Nia Esperanto-Filmo

Sendube multaj legantoj jam vidis bildon similan al nia unua foteto. Ĝi prezentas fraŭlinon kaj fraŭlon en la ĉarmaj kostumoj de ilia hejma vilaĝo : *Volendam en Nederlando*. Tamen ili ne estas ordinaraĵ Volendamanoj, ĉar la junulo estas la kaskisto de la rom-katolika Esperanto-klubo « *Volendam Viva* », s-ro S. Keizer, la fraŭlino estas lia fianĉino, f-ino N. Kwakman, kaj la foton faris s-ro Joseph R. Scherer okaze de sia vizito al Nederlando antaŭ du jaroj. De post la 3-a de septembro nunjara la tiamaĵ gefianĉoj estas feliĉaj geedzoj.

Somero estas la sezono de l' vivado en libera naturo. La kvar sekvantaj fotoj ĉiuj montras tian liberaeran vivon. Sur la dua bildo ni vidas gesamideanojn el 12 landoj, entuziasme gimnastikantajn laŭ la metodo Niels Buck, dum la tria internacia Esperanto-kurso en *Ry (Daniando)*. La loko, Popola Altlernejo en Ry, estas plej idilia ejo por tiu celo - rigardu mem! (Ensendis : Aamand.)

La tria bildeto estas « eltranĉaĵo » el semajnfina *tendarc*, aranĝita de *Tutmonda Junular-Organizo* ĉe la Lagoj de Reeuwijk en Nederlando. 83 geesperantistoj el la centro de la lando partoprenis la tendaron. La sabatvespera programo enhavis i.a. kantojn de bulgara samideanino s-ino Jahn-Atasanova, teatraĵon, kröntjong-muzikon, kampfajron kaj noktan promenadon ĉirkaŭ la lagoj.

La kvara foto kondukas nin en varman regionon : al la marbordo de Tel-Aviv en Palestino. Jen *grupeto da anoj de la Esperanto-grupo en Tel-Aviv*. Estas ĝojige ke ankaŭ en la Sankta Lando Esperanto havas fervorajn adeptojn kiuj ĝin propagandas kaj praktikas.

Fine denove al Nederlando! La kvina foto estas farita dum ekskurso al « *Hooge Veluwe* ». Partoprenis *esperantistoj kiuj vizitis la Esperanto-Domon en Arnhem* : danoj, angloj, norveganino kaj nederlandanoj. Oni haltis por trinki teon en « *Oud Reemst* ». (Foto : Kramer.)

NI RECENZAS

Revista Brasileira de Geografia, eldonata de Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, Rio-de-Janeiro, n-roj 1 kaj 2 de la unua eldonjaro 1939. IEL volonte perados mendojn je tiu gazeto, po 1s. 3p. aŭ 5 resp.-kup., por ĉiu numero, aŭ 5s. por tuta jaro.

Ĝi estas kvaronjara revuo, ĉ. 150-paĝa, lukse presita, ilustrita, kun gravaj sciencaj artikoloj de eminentaj geografoj, geologoj ktp. La artikoloj estas verkitaj en la portugala lingvo, kaj ekzistas resumoj en la lingvoj franca, hispana, itala, angla, germana, kaj (presita per pli grandaj literoj ol la ceteraj resumoj) Esperanta. En la du unuaj numeroj elstaras la sudo de Prof. P. Deffontaine, de la Universitato de Rio, pri la Homa Brazila Geografio. En la dua numero troviĝas ankaŭ tre interesa artikolo (ĉi tiu bedaŭrinde sen resumoj alilingvaj) pri la estiĝo de la Atlantika Oceano; krome statistiko pri la loĝantaro de Brazilo kaj ĝiaj unuopaj ŝtatoj. Fine de 1938, Brazilo nombris entute 44.115.825 loĝantojn sur teritorio de 8.511.189 kv. km. La plej grandaj urboj estas Rio-de-Janeiro kun 1.848.758, São Paulo kun 1.268.894 kaj Recife (Pernambuco) kun 529.863 loĝantoj. Aldonita estas landkarto (mapo) de la municipo (distrikto) Araxá en la ŝtato Minas Gerais.

Andreas Latzko : Homoj en milito. El la germana lingvo tradukis Charles Minor, LK, Ak. — Krome : Marcia Reale. El la germana lingvo tradukis N. Bartelmes. — 190 p., 14×20,5 cm. Prezo broŝ. gld. 1.50, bind. gld. 1.90. Eldono de Libro-Servo F.L.E., Postbus 4050, Amsterdam O., kaj SAT, Paris.

En vico de profunde psikologiaj rakontoj A. Latzko kun frostotremiga realeco montras terurajn, ne percepteblajn per sana imago, okazintaĵojn el la mondmilito. Kiel akuzo sonas liaj vortoj pri ĝiaj kruelaĵoj, kiuj ne ĉesas, sed restas, kiel sekvo de la milito, eĉ post ĝia finiĝo (« Reveno », « Marcia Reale »). Soifo al paco kaj forta protesto kontraŭ freneza, senŝenca hombuĉado, klare sentiĝas en la sekvantaj vortoj de lia rakonto « La kamarado » :

— Senlace mi volas skribi. Dissemi en la tutan mondon ! Ĝis kiam en ĉiuj koroj fruktiĝos la semajo, ĝis kiam en ĉiuj dormoĉambroj — fanteme blujaj — kara mortinto montras siajn vundojn kaj finfine, kiel belega savkanto de la mondo, sub mia fenestro eksonas la milionvoĉa kolerkrio : « Hom-s-a-l-a-to !! » —

Espereble multaj samideanoj akiros tiun ĉi libron, kaj — kiu ĝin akiros, tiu ne pentos.

De S.

Nova tasko. Noveloj. Elĉinigis Cicio Mar. — 80 p. 13,5×18 cm. Eldonis : Orienta Kuriero. P. O. Box 10, Hongkong.

Tiu ĉi libro estas eldonita sub la patronado de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj. La noveloj (kvini) traktas, sub diversaj aspektoj, unu saman aferon : la nunan militon kiu suferigas Ĉinion, kiu detruas ĝiajn urbojn kaj vilaĝojn, kiu mortigas ĝiajn bravajn homojn. La « nova tasko » estas tiu de la landdefendo. Kampuloj, ŝoforo, studentoj, — ĉiuj aliĝas al la armeo aŭ al la ĝerilo. Oni ne povas legi sen enocio tiujn ĉi rakontojn ; tamen ne mankas en ili la humoro. Kaj malgraŭ la terura situacio, iras tra la libro espero kaj optimismo je pli bona estonteco.

La lingvo vidigas bonan stilon kaj kontentigan korektecon, kvankam enestas eraroj kaj kelkaj strangaj esprimoj — strangaj eble nur al eŭropanoj. La preso estas tre bona, kaj pluraj ksilografajoj ilustras la tekston. K-t.

Tagiĝas. De Henry Thomas Humblin. — 7 p. 10,5×16 cm. Senpage ricevebla de : Science of Thought Review, Chichester, Anglujo.

« La malluma nokto de materialismo forpasas. La lumo de la vero kreskas. La tempo venos, kiam malsanulejoj, frenezulejoj, punejoj, kaj karceroj, ne plu estos necesaj, kaj kiam malriĉulejoj ĉesos ekzisti. » — B-lan perspektiva penetras al ni la aŭtoro. Kvankam la nunaj cirkonstancoj ŝajnas absolute refuti lian profetaĵon, tamen ni emas kredi ĝin.

F. V. Do'no : Levu la manojn ! Gaja komedio en tri aktoj. — 80 p., 12×15 cm. Prezo 5 belg. fk. Eldonita okaze de la 10-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Antverpeno 1939.

Gaja komedio nomas la aŭtoro s'an verketon. Envere ĝi estas kvazaŭ freneza miksaĵo kaj, se lerte ludata, ĝi certe ne mankos tiklegi la ridmuskolojn de l'gespektantoj. Da komikaj situacioj ĝi enhavas ja pli ol sufiĉe. Tiuj ridigaj teatraĵoj, sprite verkitaj originale, vere mankas, kaj estas esperinde ke s-ro Dorno al ĉi tiu sekvigos kelkajn pluajn.

Bernardo Ojasono : Pasoj ĉe pordegoj. Dua akto. 22 p. Presita de : Kūrtrükk, Riiütlü 4, Tallinn, Estonio. Prezo ne montrita.

La unuan nun sekvis dua akto, verkita en la sama stranga, propra « Esperanto » (?) de la aŭtoro. Domaĝe por la forĵetitaj preskosto, ĉar kiu elspezus monon por aĉeti libron verkitan en tia jargono ?

La Monstro forlasis la kaĝon

Nun la Monstro Milito elrampis el sia kaĝo. Unue ĝi alsaltis la eŭropan orienton. Ĝia fajra spirego flamigis Polujon. Sed jam ĝi sin turnis ankaŭ okcidenten. Tero kaj aĉro tremas de ĝi, kaj eĉ Oceanano spertas jam ĝian furiozadon.

Sed, kiam nun milionoj da junuloj kaj viroj estas senditaj al la frontoj, kaj centmiloj da virinoj, infanoj kaj maljunuloj angore estas atendantaj en kelkaj rifuĝejoj la falon de l' bomboj, — ni konstatu, antaŭ ĉio, ke neniu el la popoloj volis la militon. La popoloj en la profundo de sia animo estas pacamaj. Ili volas nur vivi, labori, kaj iom ĝoji. Ĉu polo, germano, ĉu anglo aŭ franco, — ili povus bonege interkonsenti kaj interkompreniĝi. Estas la militincitantoj, la ŝovinistoj, la

troambiciuloj kiuj pelas la popolojn en la mizeron.

Patrujo estas io sublima, io granda, sankta. Sed unu popolo amas sian patrujon same fervore kiel alia la sian. Kaj ne ekzistas rajto nur por unu, kaj nur senrajteco por la alia. Perforto kaj rajto ne estas la samo, kaj perforto ĉe unu flanko nepre elvokas perforton ankaŭ ĉe la alia flanko. Tion montras la historio jam de jarmiloj.

Fatala malbeno ke, malgraŭ la progresintaj kulturo kaj civilizacio, malgraŭ la grandioze evoluintaj scienco kaj tekniko, la homaro spirite postrestis ankoraŭ en la tempoj de Tamerlano kaj Ĝingiskano! Ĉu, post ĉi tiu milito, ĵus komencita, ĝi fariĝos komprenanta, kaj prudenta?

JOVAN DUĈIĆ:

LA SUNO

Li naskiĝis ĉe la Jona Maro, sur la bordoj plenaj de suno, malhelaj ĝardenoj kaj palaj statuoj, kaj kiel mevo li sin banis en lazuro de la lumo kaj en odoro de ĉiam-varmaj akvoj.

Patrino portis lin ofte tra malvarmaj ombroj de iaj arboj kies foliaro odoris per odoro de l'sonĝo.

Malfeliĉa poeto! Kiel infano li foriris en la regionon kie la ĉielo estas pala kaj frosta, sur kiu brulas blanka kaj malvarma suno, kaj sur kies bordoj ploras ventoj. Kaj unu penso, kiel vundo, rememorogis lin ĉiam al lia suna bordo, malhelaj ĝardenoj kaj kvietaj statuoj. Kaj kune kun ondoj kaj ventoj, li ploris amare kaj senkonsole ĉe la bordoj de l'melankolia fremda maro. Sed kiam liaj haroj, bluaj kiel velkinta foliaro, fariĝis blankaj, — kiam liaj pasiaj kaj belaj okuloj, kiuj iam havis koloron de l'vintra

citrona branĉaro aŭ de malprofunda maro, fariĝis malklaraj, — kiam li ekstentis en siaj vejnoj la vintron kiu ne havas printempon, la Sorto revenigis lin denove al la Jona Lando.

Ĉio estis tie kiel antaŭe. Sed li ne plu estis tiu sama: kaj la sunajn bordojn de l'gaja kaj pasia Jona Maro li ne plu povis koni. Dolore li fermas okulojn kaj enrigardas sian internon. Kaj jen! tie li vidis tiun iaman sunon, tiun strangan kaj grandan sunon kiu faris iam ke ĉio ĉirkaŭ li estis vivanta, ke foliaro estis havanta odoron de l'sonĝo, kaj ke li estis vidanta blankan kaj malvarman sangon de l'statuoj fluantan tra senmova ŝtono, kiu faras ke li ankaŭ vivas kaj suferas per profunda kaj ega pasio de l' homoj.

Ĝi estis la Suno de l'juneco kiu forpasis, Suno kiu lumis ankoraŭ nur profunde en vespera krepuskiĝo de unu animo kaj kiu donis al ĉio, kion ĝi lumigis, strangan kaj magian belon de iluzio.

Car aferoj havas ĉiam tian aspekton kian al ili donas nia animo.

El kroata lingvo tradukis D. BENCIC.

La entombigita saksa ŝipo

Unuaj aŭtentikaj detaloj de la eltrovoj en Suffolk.

TREZORO UNIKA EN OKCIDENTA EŬROPO.

Eltrovo unika en Okcidenta Eŭropo ĵus okazis en Suffolk, Anglio, apud Woodbridge (Uudbrîĝ), ĉe loko nomata Sutton Hoo (Hu), sur privata tero. Grupo de sep tombaj teramasoj staras apud golfeto de la maro. La aŭtoritatuloj de Ipswich (Ipzŭiĉ) Muzeo ekfosis tie esplorante, kaj baldaŭ evidentiĝis ke la plej granda el la teramasoj enhavis tombon de la plej granda graveco. La centro de la amaso enhavis fosajon 3 metrojn profundan kaj 9 metrojn larĝan, kaj en tiun fosajon estis trenita ŝipo 24 metrojn longa. La ŝipo, kies traboj kaj feraj vinktoj estis facile identigeblaj, estis uzita por tombo, en la maniero de pli postaj vikingaj ŝipoj.

Tiel grava ŝajnis la tombo ke la muzeaj aŭtoritatuloj alvokis la helpon de la registaro. La elfosado nun estas finita, kaj la rezultoj estas mirigaj. Oni povas diri sen troiĝo ke la tombo malkaŝita estas la plej riĉa iam trovita, ne nur en Britio sed en iu parto de Okcidenta Eŭropo. Nenia simila trezoramaso antaŭe estis eltirita el brita tero.

SAKSA REĜO AŬ PRINCO.

Malmultvorte, la tombo estas tiu de saksa reĝo aŭ princo, kaj la grupo de teramasoj devas esti la nekropolo (tombejo) de reĝa kortego. La dato de la tombo malkaŝita per la elfosado estas proksimume 600 p.K., eble iomete pli poste, inter 600 kaj 630. Ĝi, do, apartenas al la frua periodo de saksa superregado de Britio kiam la saksoj estis konvertataj al kristanismo. Sed ĉi tiu miriga entombigo okazis laŭ idolanaj ritoj, ĉar ĉiuj ĉimondaj riĉaĵoj kaj trezoroj de la reĝo aŭ princo estis enterigitaj kun li.

Iuj raportoj pri la tombo kaj ĝia elfosado jam aperis en la ĵurnalaro, sed ĝis nun nenia aŭtoritata komunikaĵo aŭ priskribo estis havebla. Oni devas memori ke la aĵoj trovitaj ankoraŭ ne estas plene ekzamenitaj, aŭ purigitaj kaj riparitaj, kaj sekve iuj firmaj konkludoj je la nuna stadio devas esti iomgrade antaŭtempaj.

La aĵoj trovitaj en la ŝiptombo estas la jenaj: Estis nur unu korpo, kaj pro la naturo de la sabla grundo preskaŭ ĉiuj postsignoj de la ostoj malaperis, sed ĝia pozicio povis esti rekonstruata kaj komprenata per la lokoj, en kiuj la personaj ornamaĵoj kaj objektoj troviĝis. La kadavro evidente estis metita en la ŝipkajuton ŝipeze. Post kiam oni plenigis la ŝipon en ĝia fosajo per la trezoro kaj aliaj objektoj, oni kovris ĝin per tero kaj konstruis monteton super ĝi. La pezo de la tero post iom da tempo enfalis la kajuton.

Inter la restaĵoj de la kajutaj flankoj kaj tegmento oni trovis la ĉefajn valoraĵojn. Tiuj montriĝis miriga aro, kies gravecon en la historio de okcidenta arto oni ankoraŭ ne povas taksii.

GLAVO, KASKO, KAJ ŜILDO.

Flanke de la korpo estis longa fera glavo kies tenilo kaj pomelo (ronda tubero ĉe fino de glavo) estis el oro mozaika per grenato. La glavingo, kiu estas polviĝinta, kredeble estis eburaj. Ĉe la kapo estis fera kasko kun bronzaĵ aldonoj. Neordinara trajto estas tio ke la viziĝero konsistis el nazpeco formita kiel homa nazo. La kasko devas esti rekonstruita, antaŭ ol ĝi povas esti precize priskribata, sed ĝi estas rimarkinda artverko. Ĉe la brakoj estis ligna ŝildo kun bronza boso (elstaranta centro) ornamita per emajlaj desegnoj. Grandega fera hakilo kaj aro de feraj lancoj, kelkaj por lignaj stangoj kaj kelkaj mallongaj ĵetlancoj, formis la ceteran armilaron.

Sed la plej rimarkindaj artverkoj estas du masivaj oraj brakringoj kun riĉaj desegnoj de grenata mozaiko kaj milefiora (itala) vitro, barbaraj kaj belaj. Ili estas treege pezaj, kaj el pura oro.

Flanke de la korpo kuŝis granda monsaĵo el ledo (de kiu restis kelkaj postsignoj) kies ekstero estis ornamita per platoj el solida oro, ankaŭ beligitaj per grenata mozaiko. En la monsaĵo estis kvardek oraj moneroj en neuzita stato, stampitaj de la merovingaj reĝoj de

Francio kaj Belgio. Ĉi tiuj moneroj ebligas al la elfosistoj, doni sufiĉe precizan daton al la enterigo. Ankaŭ estis du malgrandaj oraj fandaĵoj en la monsako.

Balteo, kiu subtenis la monsakon, ankaŭ estis ornamita per platoj el oro kaj grenata mozaiko treege bela. Ĝi ankaŭ surhavis orajn bukojn. Fine, estis akriĝaŝtono pendebla sur la balteo, muntita en oro, riĉe gravurita.

La menciitaj estis la ĉefaj eltrovaĵoj el oro, sufiĉaj por fari grandiozan spektaklon. Sed estis pliaj kaj pli rimarkindaj valoraĵoj. Multe pli grava inter tiuj estas aro de arĝentaj pladoj. Unua estas kompleta aro (eble la reĝa pladaro) de naŭ arĝentaj pelvoj ornamitaj per simpla kaj delikata desegno, gravurita interne. Ankaŭ estas du grandegaj arĝentaj pladoj, el kiuj unu havas diametron de unu metro. La alia estas pli malgranda, kaj purigite montras en la centro elstarantan virinan kapon el arĝenta oraĵo.

La grandega arĝenta plado kun unumetra diametro estas la plej grava kaj interesa unuopa objekto en la tuta tombo, ĉar ĝi havas puran bizancan fonton, estante fabrikita en Konstantinopolo. Ĝi portas la kontrolmarkon de la Imperiestro Anastasio de la frua sesa jarcento. Bizancanoj estis la elpensintoj de kontrolmarkoj kiel konataj al ni, kaj la tradicio marki arĝenton per oficialaj stampoj venis al ni rekte de Bizanco. Sur la priparolata plado estas tri perfekte legeblaj kontrolmarkoj — du enpremaĵoj de la figuro de la imperiestro mem kaj unu monogramo, kiu estas eble tiu de sankta nomo aŭ imperia nomo.

La alia granda plado portas nenian kontrolmarkon; ĝi povas esti malfrua romana kaj unu jarcenton pli antikva ol la alia.

REĜA DONAĜO AŬ RABAĴO?

La naŭ pli malgrandaj arĝentaj pelvoj ankaŭ aspektas havi orientan devenon kaj eble estis faritaj en Sirio aŭ en la bizancaj provincoj. La ĉeesto de ĉiuj en saksa tombo havas la plej grandan gravecon. Ili estas la unuaj certe bizancaj aĵoj iam trovitaj en Britio. Ili certe atingis tian barbaran kortegon aŭ kiel rabaĵo aŭ kiel reĝa donaco de la bizanca kortego. De la klarigo de ilia ĉeesto ĉi

tie ĉefe dependas la identigo de la nomo de l' mortinta saksa reĝo.

Ankaŭ estis granda kvanto da aliaj aĵoj malpli gravaj; grandaj bronzaĵoj kaldronoj kaj pelvoj, kelkaj pendeblaĵoj, kaj la rompitaj restaĵoj de ne malpli ol naŭ arĝente muntitaj trinkkornoj. La arĝentaj muntaĵoj ĉirkaŭ la randoj de la kornoj kuŝis en aroj. Ankaŭ estis trovita amaso de malgrandaj lignaj pokaloj similaj al mezepokaj mazuroj (trinkpelvoj) kun arĝent-oraj randoj, plia aldono al la reĝa pladaro. Ĉi tiuj estas sufiĉe bone konservitaj. Ankaŭ du arĝentaj kuleroj estas trovitaj. Fine estas trovita granda fera aĵo kiun oni povas identigi kiel lampportilon. Ĝi konsistas el staranta fera stango kun kvar brakoj supre kruce, kun hokoj por pendigo de lampoj.

Tia estis la treege riĉa entombigo de nia saksa reĝo. Lia identeco estas ankoraŭ necerta, sed oni sugestis ke li eble estas iu nefama reĝo Raedwald kiu, komencinte kiel loka princo en Orienta Anglio, poste fariĝis reĝo de granda parto de Anglio. Oni scias ke li mortis en Orienta Anglio ne longtempe post 617 p.K. Sed ĝi povas esti la tombo de pli posta reĝo. La rimarkinda afero estas tio ke la tombo iel postrestis. Kutime ĉe reĝaj enterigoj baldaŭ poste oni penas rabi la tombon.

Estas mirige ke ĉi tiu treege riĉa tombo postrestis en homplena Orienta Anglio, netuŝita dum tiom da jarcentoj, dum ĉio, kio kaŝis ĝin for de la rabistoj, estis tri metroj da tero, kaj dum la teramasoj super ĝi estis tiel elstaraj sur la horizonto. Ĝi estas atesto al la hazardoj kaj ŝancoj de arkeologio.

FONTO DE KULTURO.

Certe la plej rimarkinda eltrovo laŭ la vidpunkto de historia prefere al arta intereso estas la granda arĝenta bizanca plado de la epoko de la Imperiestro Anastasio. Ĉi tiu sendube rangos kiel unu el la plej grandaj naciaj trezoroj de Britio, ĉar ĝi indikas la direkton, de kie ĉiu anglosaksa kulturo ricevis sian ĉefan inspiron kaj stimulon.

Oni devas memori ke neniu el la objektoj estas ĝis nun plendetale ekzaminata aŭ plene studita.

La ombro de Atlantis

(Eltiraĵoj el la verko

« The Shadow of Atlantis ».)

En Bolivio, je alteco de 12,500 piedoj super la marnivelo, situas majesta kaj bela lago nomata Titicaca, havanta areon de pli ol 9,500 kvadrat-mejloj. Pluraj insuletoj ornamas la supraĵon de ĉi tiu lago, kaj inter ili troviĝas la rimarkindaj insuloj de la Suno kaj de la Luno. Sur ambaŭ insuloj troviĝas dissemitaj ruinoj de prahistoria urbo, unu el la plej interesaj en la tuta mondo. Ĉi tiu urbo nomiĝas Tihuanaco kaj ĝi aĝas multmilajn jarojn.

Surbaze de iuj informoj, oni supozas ke Tihuanaco estis forlasita de siaj loĝantoj antaŭ ĉirkaŭ 13,000 jaroj. La imperiestroj de la dinastio de la Inca'oj, kiam ili invadis Bolivion en la dua jarcento a. Kr., trovis ĉi tiujn ruinojn en preskaŭ la sama stato kiel trovis ilin la hispanoj dek-tri jarcentojn poste. Ili trovis la urbon absolute dezertita, kaj restis nur la bele pavimitaj stratoj kaj placoj, la grandiozaj temploj kaj statuoj kaj restaĵoj de akvokondukiloj por atesti la kulturon kiu iam ekzistis en kaj ĉirkaŭ Titicaca.

Inter la ruinoj de la ciklopaj konstruaĵoj troviĝis amasoj da hakitaj ŝtonoj, tute pretaj por uzado en konstruaĵoj. La areo de la ruinoj de Tihuanaco estas ĉirkaŭ 3 kvadrat-kilometroj.

Dank' al la esploroj de germanaj sciencistoj, oni povis konstati, ke la ĝenerala alteco de la Anda montajaro estis iam multe malpli ol nuntempe. Ni povas eĉ determini proksimume la amplekson de tiu altigo; almenaŭ por la distrikto de Titicaca. Curt Bilan konstatis, ke 550-kilometra etendaĵo de ĉi tiu distrikto, kune kun koresponda strio de marbordo, troviĝis iam je 3,500 metroj pli sube ol nun. Ĉi tiu aserto bazas sur tre interesa fakto: ĉi tiu strio troviĝas markita tra sia tuta longo de horizontala blanka linio je alteco de 3,500 metroj. Ĉi tiu linio, similanta je linio desegnita per kalko, konsistas el kalksedimentoj devenantaj de iuj algoj kaj enhavantaj grandan procentaĵon da kalko. La diritaj sedimentoj havas dik-

econ de unu aŭ du jardoj, aŭ metroj. La ĉeesto de ĉi tiu blanka linio je tioma alteco konsistigas absolutan pruvon de tio, ke iam en la pasinteco la tuta etendaĵo, kaj sekve la nuna bordo, staris multe pli sube kaj eĉ subakvigite en la oceano. Ĉi tiu teorio subtenigas egale de la eltrovo de la elfluoj de antikvaj riveroj je la nivelo de l'antikva marnivelo.

Gviditaj de iuj hieroglifoj sur la portalo de la Suna Templo en Tihuanaco, la astronomoj de l'Observatorio de Potsdam konstatis la pozicion de la suno je l'epoko de la konstruado de ĉi tiu sanktejo. Ili trovis ke, ĉirkaŭ la jaro 9,550 a. Kr., ĉi tiu konstruaĵo ankoraŭ ne estis finkonstruita. Proksime al la templo oni vidas postsignojn de nefinita marhaveno, kiuj pravas ke, en tiu epoko, Tihuanaco situis sur la bordo de la oceano. Grandegaj unuŝtonaj kolonoj, kiuj kuŝas ĉirkaŭe, montras ke la konstruistoj subite devis forlasi la konstruadon.

Ĉi tiu dato de 9,550 koincidas kun la dato de la Atlanta katastrofo donita al Solon de la pastroj de Sais ĉirkaŭ 500 jaroj a. Kr. Ili diris al li, ke la katastrofo okazis pli ol 9,000 jarojn antaŭ tiu tempo (t.e. 9,000 jarojn a. Kr.).

Estas probable, ke okazis kosme-grava fenomeno, kiu okazigis la detruon de la Atlanta kontinento kaj samtempe levis la marbordon de Sud-Ameriko ĝis pli ol 10,000 piedoj (ĉirkaŭ 3,000 metroj).

Oni trovas ioman konfirmon de tio ĉi en la fakto ke en la najbara lando de Kolombio, t.e. apud Bogotà, ekzistas je preskaŭ la sama nivelo la fama « Kampeo de la Gigantoj » — vasta ebenaĵo kovrita de ŝtoniĝintaj ostoj de mastodontoj. Evidentas do, ke ĉi tiuj prahistoriaj elefantoj estis surprizitaj de subita levigo de ilia kutima paŝtejo kaj ke ili pereis de malvarmo kaj de subita maldensiĝo de l'aero.

La Profesoroj R. Müller kaj A. Poznansky esploris la Andan altplataĵon kaj trovis tie multe da ruinoj de palacoj kaj temploj, situantaj iufoje sur neatingeblaj rokaĵoj. Iliaj konkludoj pri la datoj praktike akordas: ili decidis ke la Tihuanaco

La vivo sur submara ŝipo vidpunkte de la higieno

Sur la transatlantikaj ŝipoj multaj povas ĝui tiom bonan komforton kiom en luksa notelo. Sed ne estas same por ĉiuj kiuj devige vivas sur submara ŝipo; ĉar, tie ĉi, la tuto de la ejo estas trege limigita; oni kalkulis ke, kutime, ĉiu submarŝipano nur disponas por si mem unu kubmetron da aero.

Ĉiu scias ke, kiam homoj vivas en iu ajn ĉirkaŭfermita loko, la entenita aero rapide difektiga kaj, post ne longe, iĝas maldoma por bona spirado; la kvanto da oksigeno, gaso necesega por la vivo, senĉese malpliiga; produktiga karbonata acido, kiu estas vera veneno por la homa organismo. En submara ŝipo multaj aliaj kaŭzoj ol la spirado de la loĝantoj kontribuas malpurigi la aeron: vaporoj de petrolesenco devenantaj de la Diesel-motoroj, vaporigoj el la ŝmiradoleoj, multaj eligaĵoj malutilaj kiujn liveras la akumulatoroj, ktp. Feliĉe la kondiĉoj de la vivo sur submara ŝipo estas diversaj laŭ la momentoj; la subakvigo ne estas senĉesa; multo mankas.

Kiam la ŝipo ankradas, kiam la maro estas trankvila, kiam la vetero estas bela, la plej granda parto de la ŝipanoj restadas sur la ferdeko, do laŭ tute bonaj higienaj kondiĉoj.

Kiam la ŝipo surmare moviĝas, la interno nur komunkiga kun la ekstera aero per

kulturo floradis antaŭ ĉirkaŭ 14,000 jaroj. Plue, iliaj esploroj pruvas ke la aluditaj gentoj posedis profundan scion de astronomio kaj matematiko, kaj faris uzon de apartaj alfabetoj kaj kalendaro, kiuj estis multe pli ekzaktaj ol la niaj. Ili estis probable la fonto de la grandaj kulturoj nomataj Tolteka kaj Maja.

La keramikajoj trovitaj inter la ruinoj de Tihuanaco estas ornamitaj de desegnoj, kiuj iufoje reprezentas la malaperintajn bestojn de prahistoriaj epokoj; ĉi tio montras la grandaĝon de la Titicaca raso kaj de ĝia kulturo.

S. NICHOLL.

la kiosketo kiu superestis. Speciala aparato permesas konstante renovigi la aeron entenitan en la interno.

La plej malbonaj kondiĉoj okazas kiam la submara ŝipo subakviga. La renovigo de la aero iĝis tute nebla. Oni kalkulis ke post 18-hora restado subakve, se estas proksimume 30 ŝipanoj, la aero entenas 3 0/0 karbonatan acidon; la kvanto da oksigeno malpliiga, kaj iĝis nur 18 0/0 el la norma. Sed aranĝoj diversaj permesas grandparte ripari tiujn malbonaĵojn. Tuboj entenantaj premitan oksigenon liveras, se bezone, tiun necesegan gason. Estas kemiakaj sorbas la hidrogenon kaj la karbonatan acidon proporcie kiel ili produktiga. La sanigado fariĝas dank' al pulvorŝprucigado de kontraŭsepsaĵoj. Ni ne povas liveri pluajn detalojn, ĉar ili estas tro teknikaj por interesi la legantojn.

Estus dezirinde ke, en la kinematografado, estu montrata al la publiko la filmo kiun, antaŭnelonge, D-ro Oudard prezentis antaŭ la anoj de la Pariza Medicina Akademio. Ĝi detale evidentigas la diversspecajn antaŭzorgojn kreitajn por liveri al la submarŝipanoj spireblan aeron dum la subakvigo; ili estas higieno, tiom kiom eble, vestitaj, nutritaj, kuŝigitaj. Koncerne la akcidentojn, la temo angorigas; antaŭnelongaj katastrofoj montras ke novaj serĉoj estas necesaj; esperu ke novaj eltrovoj malhelpos al novaj hekatomboj.

Fine mi ekrimarkas ke mi ne aludis al la ĉeesto de kuracisto en la submara ŝipo. En Francujo, dum la krosadoj, unu militkuracisto estas destinata por du submaraj ŝipoj. Sed ĉiu ŝipano estas, zorge, funde, ekzamenata ĉiusemonate; eĉ rentgenologie.

Doktoro BRIQUET.

MATEMATIKO.

Fisistoj Per kaj Johan sidas sur la ferdeko de sia ŝipeto, interparolante pri la fiskaptado kaj la aktualaj prezoj de fiŝoj.

Per: Johan, kiom kostas kvin dudekoj da merlangoj laŭ prezo de 85 oeroj por unu dudeko?

Kvinminuta silento. Fine diras Johan:

— Ĉu pri merlangoj vi demandis?

Per: Jes.

Johan: Ho, vere, — kaj ĉi tie mi sidas kalkulante pri eglefinoj!!

Abunaso, la dezerta rabisto

Nordafriko havas malbonan famon kiel loko, kie troviĝas multaj rabistoj. Precipe en la Sahara dezerto, antaŭ multe da jaroj, araboj kaj aliaj gentoj sisteme pirabis la karavanojn.

Unu lerta ruza rabisto, Abunaso, havis terure malbonan famon. Li tre sukcese sin riĉigis el la komercaĵoj de la karavanoj. La plendoj pri li tiom disvastiĝis ke la franca registaro decidis sendi ambasadoron por trakti kun li. Oni promesis al li plenan pardonon kaj profitodonan registaran oficon en Parizo, kun bela loĝejo, se li nur ĉesos rabi komercistojn kaj fariĝos honesta persono. Al tiu peto kaj propono li tute rifuzis aŭskulti kaj daŭrigis la rabadon.

La francoj decidis sendi kontraŭ li militistojn. Kontraŭ tiuj li lerte manovris per ĝenoj, malhelpoj kaj subitaj atakoj, ĝis fine en la dezertomezo li sukcesis kapti iliajn provizaĵojn. En tia senpova stato ili ĝoje konsentis trakti kun la rabisto, kiu donacis al ili sufiĉe da provizaĵo por ebligi revenon al la plej proksima francokupita urbo.

Dum longa tempo post tio Abunaso rabis seninterrompe. Sed denove la plendoj trafis la francan registaron kaj devigis ĝin entrepreni novan agadon kontraŭ la rabisto. Ĝi sendis pli grandan armeon kaj, por instigi la soldatojn, promesis donacon de 20,000 frankoj al tiu, kiu kaptos lin vivan aŭ senvivan.

La rabisto baldaŭ aŭdis pri la nova entrepreno kaj kiel prudenta homo sin retiris de la pli granda potenco. La francoj sekvis lin pli kaj pli malproksimen en la dezerton. Tie li ĝenis ilin kiel eble plej multe precipe tiam, kiam ili serĉis akvon, atakis ilin subite kaj forkuris, antaŭ ol la armeo povis pretigi sin por ĉasi lian bandon.

Ellacigite pro la varmeĝo kaj manko de pura akvo, la franca armeo ne povis sendifekte kontraŭstari ventegan sirokon, kiu subite blovis kaj multe difektis la tendaron. Dum tumulto kaj detruo la araboj facile kaptis la tutan armeon. Por liberigi ilin, la franca registaro devis pagi 25,000 frankojn.

Jaron post jaro Abunaso daŭrigis la rabadon. Sed raportoj pri novaj elpensadoj, kiuj faciligas la vojaĝadon kaj veturadon de armeoj, kaj la alproksimiĝo de maljunaĝo avertis lin ke li devas pensi pri la estonteco. Post longa meditado li decidis proponi al la franca registaro praktikan kaj honestan projekton.

Volonte li ĉesigos la rabadon, se la franca registaro garantios al li leĝe, por ĉiam kaj oficiale, la nedisputeblan posedon de malgranda difinita teritorio en la centra Saharo.

Tre alte la franca registaro taksis tiun proponon, kaj tuj konsentis ke Abunaso ricevu la laŭleĝajn dokumentojn. Kompreneble la famo pri tiu konvertiĝo disvastiĝis ĉie, kaj la ĵurnaloj diskutis la aferon. Ili presis temojn pri la fama rabisto Abunaso, nun la honesta amiko de la franca registaro kaj ankaŭ ĝia nova kuraĝa vasalo.

La religiuloj citis lin kiel ekzemplon pri la influo de la religio.

La socialistoj diris ke li estas sensenculo tiel fordoni la povon.

Ankaŭ la vojaĝistoj ĝojis ke nun ili povos vojaĝi senriske.

Gratuloj venis al Abunaso, ĉar li nun estis laŭmoda favorato.

La karavanoj sentime vojaĝis trans la dezerton kaj vizitis la tendaron de Abunaso. Li afable akceptis ilin kaj tutekore demandis pri la sano de gepatroj, parencoj kaj amikoj, kaj samtempe ekspluatis ilin senkompate per grandaj postuloj tiam, kiam ili deziris akvon, fruktojn, nuksojn ktp.

La karavanestroj multe plendis ke li rabas ilin, sed li montris al ili la dokumentojn kaj klarigis ke li, tiel same kiel ili, estas komercisto kiu vendas por kiel eble plej bona prezo.

La franca registaro ricevis grandajn kaj emfazajn plendojn ke Abunaso ankoraŭ rabas la karavanojn, kvankam laŭ pli ruza maniero. Sed tiu argumento tute ne efikis, ĉar oni klarigis ke li nun estas laŭleĝa monopolisto sub la protekto de la registaro.

Liaj riĉaĵoj multe grandiĝis; li enuis

Impresoj orientaj:

SIMIN

Foje, fiŝkaptante, mi konatiĝis kun Simin, malgranda malgrasa hometo kun vizaĝo striita, kvazaŭ dum lia longa migrado sur la benita tero Java la plugilo ĉiun jaron denove estus farinta siajn sulkojn sur lia vizaĝo.

Li salutis min per humila: « Tabeh, toean — saluton, sinjoro! »

« Slammat — feliĉon! » mi respondis, kaj streĉis mian atenton al mia ŝnuro.

Sed jam mi estis taksinta lin. Lia kaptuko, zorgeme kaj glate volvita ĉirkaŭ lia kapo, montris al mi ke li ne estas homo el la ĉirkaŭaĵo. Lia « slendang », longa tuko en formo de jupo volvita ĉirkaŭ la koksoj, plifortigis mian konjekton. Ĝi estis el bonkvalita ŝtofo, tiel nomata « batik », t.e. kolorita laŭ speciala metodo.

Li petis permeson restadi apud mi; mi konsentis. Javanoj estas tre « kortumeaj » kaj ne komencas konversacion, antaŭ ol esti instigitaj, — almenaŭ se ili, pro longa restado en la urbo, ne perdis la kontakton kun la « adat » — regularo de moroj kaj kutimoj.

pri la centra dezerto kaj deziris vojaĝi alilande. Financa kompanio sendis agenton kiu aranĝis ĉion por li. Oni starigis novan kompanion kies direktoro estas Abunaso kun grandega salajro. Araba subdirektoro zorgis pri la komercaj aferoj en la dezerto kaj kolektis pli kaj pli grandajn enspezojn de vojaĝantoj.

Abunaso vojaĝis kien li deziris kaj fine loĝis en Parizo kie li mortis kiam li havis la aĝon de preskaŭ cent jaroj.

★

Cu estas diferenco inter Abunaso la rabisto kaj Abunaso la bienulo kun leĝdokumentoj?

La rakonto estas alegorio de la nuna mondstato kie malmulte da homoj posedas la tutan terglobo kaj devigas la ceterajn homojn subteni ilin.

Tradukis E. J. BRIERLEY.

Li kaŭris apud mi, ekbruligis cigaredon kaj restis senmova.

« De kie vi venas? » mi demandis.

« El la sudo », li rediris, montrante per la dika fingro la sudon.

« Kia homo vi estas? » mi enketis denove.

« Simin orang laoet », li klarigis al mi.

« Orang laoet », fiŝkaptisto; litere tradukita: homo de la maro. « Simin », baptonomo, ĉar kutime javanoj ne uzas la nominativon.

« Do, vi ankaŭ ŝatas la fiŝkaptadon? » mi konkludis.

« Jes, sinjoro », li konfesis, « sed mi ne ŝatas fiŝkapti per ŝnuro. Mi amas la vastan maron, kie mi kaptas amase per retoj. »

« Tamen vi ne malŝatas rigardi mian okupon », mi konstatis, ridetante.

Li silentis momenton, poste aldonis: « Mi nur serĉas distron. »

Subite mia ŝnuro deruliĝis de la ŝnurtenilo kvin metrojn — dek metrojn. La javano eksaltis, liaj okuloj ekbrilis. « Enten gedeh — estas granda! »

En sia ekscitiĝo li uzis sian gepatran lingvon, ĉar ĝis nun ni parolis malaje, kiel estas kutimo inter nekonatoj.

« Jes », mi konfirmis en sama lingvo. Dume mi klopodis retiri la ŝnuron. La rezisto montris al mi ke la ekkrio de mia konato estis prava. Kiel pendolo la ŝnuro moviĝis — dekstren-maldekstren, enprofundiĝis, supreniris.

Konstante tirante, glitigante kaj denove retirante la ŝnuron, mi tiom lacigis la fiŝon ke ĝi fine rezignis ĉiun reziston. Ĝia silueto nun bone desegniĝis sub la nivelo de la akvo.

« Wah », ekmiris la javano, « estas ŝarko! »

Ankaŭ mi estis surprizita. En tiu loko, la bordo de haveno, kie estas vigla trafiko, mi ne atendis tian beston. Klare mi nun vidis la pintan elstarajon sur la dorso kaj la posteniĝantan makzelon. Ĝi estis granda proksimume unu metron. Mi nun embarasiĝis. Kiel kapti ĝin... Se mi tiros ĝin el la akvo, tiam eble la hoko rektiĝos, aŭ la buŝego de la besto disŝiriĝos. Ambaŭkaze mi povos postrigardi ĝin.

Okule mi serĉas ĉirkaŭe, ĉu eble rem-

Klôsetoj-Sonoriletoj

Popola kanteto

*En ĝardeno kreskas floro,
juna floro, ruĝa flor' —
mia gaja ĝoja koro,
ĝojas koro, tremas kor'.*

*Staras ĉe river' saliko
verda arbo, junsalik' —
min atendas koramiko,
mia kara jun-amik'.*

*Flugas en ĝarden' abelo,
flug-abelo, zum-abel' —
mia kara juna belo,
gajas belo, ĝojas bel'.*

*Marŝas sur salik' skarabo,
zum-skarabo, maj-skarab' —
sidas sub saliko knabo,
sidas mi kun mia knob'.*

*Venas milda roz-vespero,
vespereto, pacvesper' —
restas mi kun jun-espero,
karespero, belesper'.*

*En ĉielo naĝas luno,
ronda luno, luma lun' —
en vespero revas juno,
kune bela, nia jun'.*

Anna KETSCH

boato estas proksima. Tiam okazis io, kion mi neniam forgesos.

Senhezite Simin demetas sian veston kaj, nur vestita en kalsono, li ĵetas sin en la akvon, kun tranĉilo inter la dentoj.

Subite skuo je mia ŝnuro montras ke la fiŝo rimarkas la ondon en la akvo kaj provas savi sin. Mi lasas ĝin fornaĝi, donante liberecon al mia ŝnuro, ĉar nun mi ne povas riski ke la besto liberigu.

Denove komenciĝas la barakto inter mi kaj la besto; sed en la batalo inter blinda forto kaj racia pripenso la intelekto venkas. Post iom da tempo ĝiaj fortoj elĉerpiĝas; ĝi ne plu kiel fulmo rapidas tra la akvo, sed lasas sin treni, dum ĝi montras jen la dorson, jen la ventron.

En tiu momento Simin intervenis. Subite, kiam denove la ventro de la besto vidiĝis, li streĉis la brakon kaj per lerta manrapo malfermis per la tranĉilo la

Taŭga formulo por hejma farado de pano

Oni scias ke la pano, kiun al ni liveras la panistoj, plej ofte ne estas tute kontentiga por la sano; multo mankas. Sed ne sufiĉas plendi; oni devas penadi por akiri pli bonan panon. Kiamaniere? Hejme ĝin farante, kaj tio ne estas tiel malfacila kiel multaj opinias.

Altestimata kuracisto, D-ro Bécart, ĉef-sekretario de la Pariza Medicina Societo, antaŭ nelonge, alportis al ĝiaj anoj, dum unu kunsido, panon hejme faritan; lia prezento estis tre favore akceptata. Jen lia formulo por la rapida farado de tiu pano; ĝi estas simpla, kaj tre certe interesos kelkajn legantojn:

Unue akiru bonan tritikan farunon, ĉu de kamparano kies muelisto ankoraŭ utiligas la muelŝtonojn (iam ekskluzive uzatajn), ĉu en magazeno kie oni vendas la pordietajn produktojn. Tiu faruno povas esti blanka, aŭ kompleta (kio estas preferinda por la plej multaj).

Faru unuan miksaĵon: Faruno 100 grm. Lakto kaj akvo, el ĉiu 5 supkuleron. Levuro (fermento ne kemia), aĉetebla ĉe panisto, 30 grm. Zorge miksu, kaj poste forlasu tiun paston por fermentado en sufiĉe varma ĉambro dum unu horo.

Kiam la fermentado konvene okazis, aldonu al la pasto unue, 400 grm da faruno, due, miksaĵon de varmeta akvo kaj lakto (samkvanto el ambaŭ; sume iom pli ol duono de tasego) kun unu kafkulero da malgrandpeca kuirsalo. Zorge knedu la tuton, kaj metu en muldilon kiun ĝi devas amplekse pleniĝi.

Fine lasu la muldilon en tre varma forno-kesto dum 30-40 minutoj. Ne gravas, ĉu temas pri formokesto varmigita per karbo, per gaso aŭ per elektro.

Dezirante al vi bonan sanon, mi esperas ke vi provos la formulon de D-ro Bécart; kiam vi estos manĝinta tian panon, sanan, bongustan, vi ne p'u akceptos alian. Bonan apetiton!

Doktoro BRIQUET.

ventron de la besto. Baldaŭ la akvo koloriĝis per sango. Nerva skuo trairis la beston de la kapo ĝis la vosto. Tio estis la fino.

Kiam mi poste diris al Simin ke lia faro estis kuraĝa sed malsingarda, ĉar li riskis akcidenton, eble la vivon, tiam li respondis simple: «Kaloé datang tjelaka, toean Allah soekah — kiam okazas akcidento, tiam Dio volas. »

J. H. A. SENS.

Internacia Esperanto-Ligo

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 130. 30an de Aŭgusto, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ

Britujo.

Leamington Spa. FD : Esp.-propagando : La D.

Danujo.

Herning. FD : Esp.-propagando : La VD.

Franca Gujano.

Cayenne. D : R. Martin, Territoire Tuini, par Cayenne.

Hispanujo.

Vendrell. FD : Terkulturo kaj Kokbredado : La D.

Polujo.

Tarnów. D : S-ino T. Zielonkowa, ul. Krakowska 77.

SANGOJ.

Britujo.

Brightlingsea. D : vakas pro la bedaŭrinda morto de S-ro C.B. Morgan.

Finnlando.

Oulu. D : vakas pro translokiĝo.

Latvujo.

Jelgava. D : nova adreso : Virspavelnieka iela 56-11.

Madagaskaro.

Antsohihy. D : vakas pro translokiĝo.

PATRONO.

Aafable aliĝis kiel Patrono por 1939 :
17. D. Kennedy, Glasgow, Skotlando.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

OFICIALA INFORMILO

N-ro 131. 13an de Septembro 1939.

NOVAJ DELEGITOJ

Britujo

Barry (Glam). VD : F-ino E. Downes, 4, Robert Street.

Burnley (Lancs.) FD (Instruado) : F. Parker, 368, Colne Road.

Franclujo

Hermies (Pas de Calais). FD (P. T. T. kaj Filatelio) : P. R. Filliatre, Receveur des P. T. T.

Jugoslavujo

Zagreb. FD (Medicino) : D-ro A. Schwarz, Solovjeva 16.

Nederlando

Voorschoten. FD (Orkideokulturo) : G. T. Odiĵk, Veurscheweg, 183.

Portugalujo

Amadora. D : M. de Sousa, R. Elias Garcia 31, Venda-Nova.

Elvas. D : J. M. Abreu e Silva.

SANGOJ

Aŭstralio

Tamworth. D vakas.

Brazilo

Santo André. D : adresŝanĝo : Rua General Glicerio 357.

Britujo

Newcastle-on-Tyne. VD : adresŝanĝo : 318, Heaton Road.

Portsmouth. VD : adresŝanĝo : 125 Kirby Road.

Thorpe Bay. D : vakas pro translokiĝo.

Franclujo

Nancy. FD : (Gazetaro kaj juro) : vakas pro translokiĝo.

Portugalujo

Lisboa. FD (Veterinarscienco) : vakas pro translokiĝo.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

OFICIALA INFORMILO

N-ro 132.

2an de Oktobro 1939

NOVAJ DELEGITOJ

Jugoslavujo

Vinkovci. FD (Esp.-propagando) : B. Vanĉik, Kozarĉeva 39.

Kenya Kolonio

Kabete. D : J. Williamson, Church Missionary Society, Kabete.

Nederlando

Alme'o. FD (Esp.-propagando) : F-ino G. H. Benink, Molenkamppark 8.

SANGOJ

Britujo

Monkseaton. D : adresŝanĝo : 55 Thorntree Drive, West Monkseaton.

St. Andrews. D : adresŝanĝo : 131 South Street.

Danujo

Aa. ius. FD (Poŝto) : vakas.

Francujo

Fontaine. D : vakas pro translokiĝo.

Hispanujo

St. Adrián del Besos. D : adresŝanĝo : Av. Primo de Ribera 17.

Kenya Klonio

Dabida. D : vakas pro translokiĝo.

Nederlando

Hoogezaand. D : adresŝanĝo : Verl. Zuiderstr. 36.

Nijmegen. D : vakas pro translokiĝo.

Rotterdam. VD : adresŝanĝo : Dirk Hoffstr. 24b.

Svedujo

Stockholm. FD (Religio) : adresŝanĝo : Rindögatan 15-VII.

Usono

Iowa City : D : adresŝanĝo : Box 14.

FD (Scienco) : adresŝanĝo : Box 14.

New Haven. D : adresŝanĝo : 22 Edgar Street.

PATRONO.

Afable aliĝis kiel Patrono por 1939 :

18. G. Bevan, Wrexham, Kimrujo.

ŜTATISTIKO

Membro. Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Septembro, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Septembro 1938.

	30-9-38	30-9-39
Asociaj Membroj ...	7335	7356
Individuaj Membroj :		
MJ	1320	1414
MA	1011	1080
MAH	301	368
MS	132	78
Patronoj	11	18
DM	73	73
HM	30	30
	2878	3061
	10213	10417

Korespondadoj. Centra Oficejo (sen la gazeto) dum Septembro 1939 :

Ricevitajj	244
Senditajj	1553
	1797

Iandaj Asocioj : novaj adresoj :

Brita Esperantista Asocio, Esperanto House, Herongate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Itala Esperanto-Federacio, Casella Postale 960, Milano.

Svisa Esperanto-Societo, D-ro M. Jaccard, Voegsangstr. 11, Zürich.

Jarlibro. La milita situacio kaŭzis tiom da adresŝanĝoj, ke suplemento al la Jarlibro tute ne povas esti aktuala. Ni ne eldonos ĝin en la nuna jaro, sed ni klopodos eldoni la jarlibron 1940 kiel eble plej frue — kredeble en Marto.

Donacoj. Dum la lastaj semajnoj ni ricevis multajn donacojn por helpi al la forigo de la defecito. Post nelonge ni publikigos liston de la donacintoj, sed ni nun tre kore dankas al ĉiu pro tiu helpo.

Cecil C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

Internacia konkurso 1939

Stato je la 30-a de Septembro, 1939.

Poentoj

	Elirbazo	1939	%
1. Portugalujo	303	724	239.0
2. Finnlando	250	548	219.2
3. Brazilo	429	663	154.5
4. Jugoslavujo	694	991	142.8
5. Polujo	683	950	139.1
6. Hungarujo	574	731	127.4
7. Aŭstralio	489	561	114.7
8. Britujo	6594	7319	111.0
9. Argentino	309	327	105.8
10. Nov-Zelando	444	462	104.0
11. Usono	1597	1643	102.9
12. Nederlando	3253	3315	101.9
13. Svisujo	693	700	101.0
14. Danujo	1038	1043	100.4
15. Svedujo	3215	3166	98.5
16. Belgujo	1747	1712	98.0
17. Norvegujo	1060	1038	97.9
18. Francujo	5503	5330	96.8
19. Japanujo	517	427	82.6
20. Italujo	561	385	65.1
21. Grekujo	250	130	52.0
22. Hispanujo	885	429	48.5

Unueco estas Forto

ONI ANONCAS

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperantistaro, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtgiro 1306.30 ('s-Gravenhage)**. Familiaj anoncoj senpage.

Naskiĝo Hide. La 28.8. naskiĝis al ges-roj William W. kaj Florence Irene Hide, IEL-del. por **Southsea** (Hants.), Anglujo, dua fileto, nomita John Egerton, estonta samideano, « denaska esperantisto », loka grupano, BEA-membro kaj IEL-ano. Liaj gepatroj estas membroj de la Portsmouth'a Esperanto-Grupo, kaj lia 23-monata frato David Wallace jam estas « danes esperantisto ». — Koran gratulon!

Letervespero. Al letervespero de Konversacia Esperanto-Klubo, Stenosgade 7, **Köbenhavn**, Danlando, la 12-an de oktobro bonvolu multnombre sendi leterojn, poŝtkartojn kaj Esperantatajn! Respondo garantiata.

Dekoro. Nia pola samideano J. Grenkamp, Pariza korespondanto de « Gazeta Handlowa », konstanta membro de la Asocio de Pola Gazetaro ĉe la Internacia Journalista Federacio, estas nomita Kavaliro de la Franca Honora Legio. — Koran gratulon!

Sekve de nia anonceto alvenadas poŝtkartoj amasege. Koran dankon! Al ĉiuj oni respondos akurate. Tamen skribu plej klare, precipe adresojn! Instruistino Alice Gomes, Escola Normal, **Alagoinhas (Bahia)**, Brazilo.

Propagandu per senpagaj esperantlingvaj prospektoj! Mendante ilin, sendu vi al ni unu respondukuponon por poŝtelspezoj, kaj vi ricevos 6-8 tiajn diverslandajn belajn prospektojn. — Esperanto Kulturpropaganda Instituto, Poŝtkesto 6, **Budapest 3**, Hungarujo. (606)

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

Fak-optikisto, 33-jara, intencas elmigri kien ajn, kie estas bezonata fakulo. Kiu akceptus lin, aŭ kiu scias kie oni bezonas fak-optikiston, tiu bonvolu skribi al Franz Springer, Hlnkova 24, **Nitra, Slovakujo**.

Muzikan fakvortaron de Ménil serças : Young, Belmont, **St. Moritz**, Svislando. Ankaŭ korespondas kun seriozaj muzikamantoj. Volonte diskutas terminojn. (605)

Sveda metisto deziras havi eksterlandajn geamikojn. Skribu pri kio ajn; mi tuj respondos. S-ro Harald Danielsen, Agärde, **Långserud, Svedujo**.

Mi deziras korespondi kun kooperativanoj en ĉiuj landoj. Kolektas materialon por fari ekspozicion. Certa respondo. A. Frederik Jensen, Bæslum kooperativo, **Ebeltoft, Danujo**.

JUS APERIS LA 14-a ELDONO
de

Bes - Adresaro

de esperantistoj el ĉiuj landoj
por la j. 1939/40.

Kun 810 adresoj (eĉ portretoj) eĵ pli ol 20 landoj. — Kun detala registro de aliĝintoj laŭ profesio kaj inklinoj. — La bele presita kaj praktike aranĝita 72-paĝa broŝuro bone servos kaj certe plaĉos al ĉiu esperantisto! — Prezo 1.— sv. fk. (0.50 guld. aŭ 1 s. 2 p. aŭ 4 respondkup. aŭ egalvaloro). — Postulu de ĉiuj Esperanto-librejoj aŭ Esperanto-eldonejoj, aŭ rekte de la eldonejo BES, Potštejn, Ĉeĥomoravio.

Reprezentanto por Nederlando :
Heroldo de Esperanto, Scheveningen. (604)

El nia propra eldonejo

ni rekomendas la sekvantajn bonkonatajn librojn.

La prezoj estas indikitaj en nia landa; guldencj kaj enhavas la sendkostojn.

Blicher: Taglibro de vilaĝpedelo	0.15	Kloepffer: Vagabondo kaj sinjorino. Ro-	
Boatman: Jes, panjo. Komedieto	0.15	mano	1.50
Boatman: La nekonata konato. Mistera		La sama, bindita	2.40
rakonto	1.20	La Maro. Rakontoj. Bindita	1.50
La sama, bindita	1.80	La Multekolora Libro. Nomita « la inte-	
Bröther: Rübezahl	0.15	lekta legolibro »	0.75
Bukedo. Rakontoj	0.15	La senkorpa Mistero	0.15
Bulthuis: Malriĉa en spirito	0.15	Maxwell: Anstataŭa edzino, Romano	1.50
Elola: La amo en la jaro dekmil. Romano		La sama, bindita	2.40
(352 paĝoj)	1.50	Meye: La longa vojo. Romano originale	
La sama, bindita	2.40	verkita en Esperanto	1.20
Forst de Battaglia: La mistero de l'sango.		La sama, bindita	1.80
Kun multaj ilustraĵoj	1.20	Mozaiko. Varia legaĵo	0.15
La sama, bindita	1.80	Oberrotman: La lastaj tagoj de D-ro L. L.	
Grimm: Du fabeloj	0.15	Zamenhof. Ilustrita	0.60
Haefker: Jarmiloj pasas. Mondhistorio origi-		Oriento. Rakontoj ktp. Bindita	1.50
nale verkita en Esperanto. La plej bela		Osmond: Kiki, du volumetoj, kune	0.30
Esperanto-libro laŭ bibliofila vidpunkto.		Remarque: En okcidento nenio nova. Ro-	
En unu volumego kun fortika ŝirmko-		mano el la mondmilito	2.40
vrilo	4.50	Scherer: Ĉirkaŭ la mondon kun la verda	
La sama, lukse bindita, en du volumoj		stelo. Riĉe ilustrita	2.25
kun ledaj dorsoj, verde kaj ore sur-		Scott: Filatela terminaro	0.30
presitaj	6.30	Storm: Du majstro-noveloj	0.90
Hesse: Sonoj novaj kaj malnovaj	0.15	La sama, bindita	1.50
Hohlov: La tajdo	0.30	Sub la signo de l' Espero	0.15
Isac (trad. Morariu). Sonorilo kaj kanono.		Tolstoj: Aelita, aŭ: La Marso formortanta.	
Rakontetoj	0.30	Romano	1.20
Jung: La Alta Kanto de la Amo	0.30	La sama, bindita	1.80
Jung: Landoj de l' Fantazio. Romano	1.50	Trögel: Esperanto kaj kulturo	0.30
Kilian: La mondon al ni!	0.60	Wiesenfeld: Galerio de Zamenhofoj	0.30
Kitzler: Internacia gramatiko de Esperanto	1.20	Wingen: Kiel aranĝi kursojn kaj grup-	
		vesperojn?	0.15

Heroldo de Esperanto

Harstenhoekweg 223

SCHEVENINGEN (NEDERLANDO)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Lange Leemstraat, 127, Antverpeno, Belgujo.

